

BULGARA

ESPERANTISTO



3-1980

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





Malina Kamenova, diplomita instruistino de Esperanto, ame gvidas sian duagradan E-kurson en la angla-lingva gimnazio de u. Vidin.



Plensukcese finiĝis E-kurso en Varna sub la gvido de lili Andreva, diplomita E-instruistino.

Kun bona rezulto finiĝis elementa E-kurso en Pavel Banja, distr. Stara Zagora.



ENHAVO

* Al energia kaj sistema kunlaboro kun la Patrolanda Fronto	1
L. I. Brejnev. Senkompromisa ekstera politika kurso	2
Anton Antonov. Sukcesa 6a VARE en Kubrat	3
* Antaŭkongresa aktiveco en la Sofia Distrikto	4
Nikola Nikolov. Vojo al sukceso	4
Stama Vasilleva. Originala kaj imitinda solenaĵo Verjiniĵa Dokova. Verda steleto brilas en Nord-okcidenta Bulgario	5
* Literatura vespero pri Hristo Gorov	6
* Vazov en angla lingvo pere de Esperanto	6
Penka Papazova. Mi serĉis	7
La naskiĝtagoj	7
Elena Popova. Vjetnamio	7
Nadja Andrianova. Espero	7
Blaga Dimitrova. Dezertoj. Tvaduko de Cvetanka Adamova	7
Inlta Tamoŝiunene. Voko	7
Dimitro Denĉev. La interesa libro de k-dino Veceva	8
Nadja Jejnova. Ciklonaj leĝoj	9
Elka Konstantinova. Profunde nacia, pasie partia verkisto	10
Georgi Karaslavov. Poneĝo armilo	11
Hristo Manolov. Pi-rre de Coubertain kaj la paco	11
Nano Kjuĉukov. Digna filo de nia popolo	12
* El la leteroj de Trifon Hristovski. El lia korespondado	13
Alis Konstantinova. Cebro de patrono	13
Evgeni Georgiev. La fondinto de UEA	14
* Novjorka oficejo de UEA establita. Agado en 1979	15
A. Korjenkov. "Lazura tajgo — 4"	15
* Grava por 12—14-jaruloj	15
Mioara Dobre. Cebro de N. Alek iev en Rumano	15
Ljudmila Paspaleeva. La prapava pelerino	16
Marin Bacev. Serce dirite, cele pensite	16
Ljudmila Jevsejeva. Arbara kuracisto. Zoo-studo	111
Marija Kolarova. Panjo	111
Stano Marĉek. Arkokrucenigmo	111
* Ĉu vi estas observema?	111
* Naciaj E-araĝoj dum 1980	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Laŭ bela popolo kutimo komen e de marto gebulgaroj d koras sian bruston per «martenica» — ornamo el du kuntorditaj fadenoj — ruĝa kaj blanka. Martenica simbolas sanon kaj feliĉon.

Redakta komitato:

Kuneo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BŬROVANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAGIEV, Krāstju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi Garev

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919
Eldonkvanto 6100.



AL ENERGIA KAJ SISTEMA KUNLABORO KUN LA PATROLANDA FRONTO

La Patrolanda Fronto estas la plej amasa socipolitika organizaĵo de la bulgara popolo. Ĝi naskiĝis en la fajro de la batalo kontraŭ la "monarkofaŝismo". Nun ĝi enkorpiĝas la unuecon de ĉiuj popolaj fortoj en la komuna laboro kaj batalo por konstruo de matura socialisma socio en nia respubliko, en la batalo por paco kaj internacia kompreniĝo.

Grandega estas la organiza kaj eduka laboro de tiu ĉi demokratia kaj senpartia organizaĵo por mobilizado de ĉiuj kreaĵ fortoj de nia popolo, por plua altigo de ĝia bonstato kaj por la ĉiufanka disfloro de nia patrujo. Tiu laboro superas la limojn de nia lando kaj ludas gravan rolon por firmigo de la kunlaboro kaj kompreniĝo de la bulgara popolo kun la ceteraj popoloj en la Balkana Duoninsulo, kun la popoloj en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

La Bulgara Esperantista Asocio estas kolektiva membro de la Patrolanda Fronto. La prezidanto de BEA Hristo Gorov kaj la membro de la Buroo de BEA Nikola Aleksiev estas membroj de la gvidaj organoj de Patrolanda Fronto. Samtempe multaj e-istoj en la lando partoprenas plej aktive en la laboro de tiu ĉi tutpopola organizaĵo kiel membroj de ĝiaj distriktaĵ, komunumaj kaj lokaj estraroj.

La kunlaboro de BEA kun Patrolanda Fronto, kiu nombras ĉirkaŭ 4 milionojn da membroj, estas granda akiraĵo de BEA, ĉar tio altigas la aŭtoritaton de la bulgara esperantistaro antaŭ la tuta bulgara socio. Samtempe ĝi malkovras eksterordinare grandajn eblecojn pri diskonigo de la populatila laboro de la bulgaraj e-istoj, pri manifestado de ties noblaj ideoj de pura patriotismo kaj arda internaciismo, de krea amo al la paco kaj internacia kompreniĝo.

Bona ekzemplo pri tiu kunlaboro estis la organizita en novembro pasintjare renkontiĝo de la e-istoj de sudokcidenta Bulgario kun la socio de u. Kjustendil, dediĉita al la batalo por paco kaj internacia malsstreĉeco. Tiun bonegan renkontiĝon gvidis la prezidanto de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en Kjustendil. Centoj da membroj de Patrolanda Fronto kune kun la venintaj e-istoj levis alte

sian voĉon defende al la paco sur nia planedo, senmaskigis kaj kondamnis kolere la bruligantojn de militoj kaj malamo inter la popoloj.

Pri la graveco de la kunlaboro de la bulgara E-movado kun la Patrolanda Fronto parolas ankaŭ la fakto, ke la Loka Kongresa Komitato (LKK) de la ĉi-jara 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en Plovdiv laboras sub la prezido de k-dino Sijka Nejкова — prezidantino de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en Plovdiv.

Similaj manifestiĝoj de intima kunlaboro de la organizaĵoj de Patrolanda Fronto kaj la E-societoj ekzistas. Tio estas kunvenoj, celebroj, mitingoj, spektakloj, koncertoj, ekspozicioj, amasa klarigado de gravaj registaraj dokumentoj, organizado de libervolaj laborbrigadoj, kolektado de refoje uzablaj krudmaterialoj, de drogherboj kaj sovaĝaj fruktoj k. a.

Sed ni devas konfesi, ke tiuj manifestiĝoj ankoraŭ estas malmultaj. Pluraj E-estraroj subtakso tiun gravegan kunlaboron, ne serĉas la estrarojn de la Patrolanda Fronto, ne kreas intimajn ligojn kun ili. Ekzemploj pri tio abundas ĉie.

En siaj decidoj la Sepa Kongreso de la Patrolanda Fronto kategorie substrekis la gravecon de la kuna laboro kun la amasorganizaĵoj — ĝiaj kolektivaj membroj, inter kiuj estas ankaŭ BEA.

Konsiderante la grandegajn kaj neuzitajn ĝis nun eblecojn de kunlaboro kun la Patrolanda Fronto, la Centra Estraro de BEA atentigis pri tio ĉiujn E-organizaĵojn per speciala instrukcio. Ĉiu estraro de BEA devas atente traludi tiun instrukcion kaj surbaze de ĝi ellabori planon pri konkreta agado. Sed oni neniam forgesu, ke la kunlaboro kun la Patrolanda Fronto devas esti efektiva taktike, realisme, sen altrudo. Ne ekzistas dubo, ke bone, serioze pripensita kaj organizita kuna laboro kun la Patrolanda Fronto donos utilajn fruktojn por ambaŭ organizaĵoj. El ĝi gajnos kaj la Patrolanda Fronto, kaj la bulgara E-movado, kaj la tuta bulgara popolo. El ĝi gajnos la paco, la socialismo, la homaro.

SENKOMPROMISA EKSTERA POLITIKA LENIN-KURSO

EL LA RESPONDOJ DE L. I. BREJNEV AL DEMANDOJ DE KORESPONDANTO
DE J. «PRAVDA» LA 10AN DE JANUARO 80

La konsekvenca kaj krea apliko de la kurso de nia Partio al paco, malstreĉeco kaj malarmigo, por efektivigo de la paca programo, akceptita de la XXIV kaj XXV kongresoj de la Komunista Partio de Sovetunio (KPSU), permesis atingi multon. La baza, la ĉefa, kiun ni sukcesis fari, estis tio, ke ni rompis la magian cirkon: mondmilito — mallonga paca paŭzo — donove mondmilito.

Sed ĉe la limo inter la 70aj kaj 80aj jaroj la internacia situacio, bedaŭrinde, grave komplikigis. La popoloj devas scii la veron — kiu estas respondeca pri tio. Mi respondos rekte: la kulpon havas la imperialismaj fortoj kaj antaŭ ĉio difinitaj rondoj en Usono. Tiuj, kiuj en la malgrandigo de la streĉeco vidas obstaklon por siaj agresplanoj, por la furiozigo de militarisma psiko, por la interveno en la internajn aferojn de la aliaj popoloj. Tiuj, ĉe kiuj profunde estas enradikiginta la kutimo kondukti senceremonie al la aliaj ŝtatoj, agi sur la internacia areno tiel, kvazaŭ ĉio estas permesita al ili.

Ekde kelka tempo oni klare vidas, ke la gvidaj rondoj de Usono kaj de kelkaj aliaj ŝtatoj de NATO prenis kurson malamikan al la malarmado, kurson de intensigo de la vetarmado, kiu pligrandigas la militminacon. Ĝian komencon oni metis en 1978 dum la maja sesio de la konsilantaro de NATO en Vaŝingtono, kiam oni aprobis aŭtomatan pligrandigon de la militbuĝetoj de la landoj-membroj de NATO ĝis la fino de XX jc. Lastatempe la militarismaj tendencoj en la politiko de Usono trovas esprimon en la akcelo de novaj longtempaj programoj de armigo, en la kreo de novaj militbazoj for de la limoj de Usono, inkluzive en la Proksima Oriento kaj en la zono de la Hindia Oceano, en la fondo de la tiel nomata „korpuso por urĝaj agoj“ — instrumento de politiko de milita interveno.

Guste Usono en decembro 1979 trudis al siaj aliancanoj el NATO la decidon, ke en kelkaj okcidenteŭropaj landoj dislokiĝu novaj raketoj kun meza radiuso de agado, kio kondukas al nova etapo de la vetarmado. Samtempe Usono simple ŝtopis la buŝon al tiuj siaj aliancanoj, kiuj estis emaj doni pozitivan respondon al la konstruktivaj proponoj de Sovetunio pri efektivigo de traktadoj lige kun tiu ĉi demando.


Hodiaŭ la malamikoj de la paco kaj sereniĝo provas spekulii per la eventoj en Afganio. Lige kun tiuj eventoj oni amasigas montojn da mensogoj, ekscitas senhontan

antisovetan kampanjon. Sed kio fakte okazis en Afganio?

En aprilo 1978 tie okazis revolucio. La afganistana popolo prenis sian sorton en siaj manoj kaj ekmarŝis laŭ la vojo de sendependeco kaj libereco. Kiel ĉiam en la historio, la fortoj de la pasinteco ekstaris kontraŭ la revolucio. Kompreneble, la popolo de Afganio povus sola frakasi tiujn fortojn. Sed jam dum la unuaj tagoj post la revolucio ĝi kunpuŝigis kun ekstera agreso, kun kruda interveno en ĝiajn internajn aferojn.

Miloj kaj dekoj da miloj da kontraŭrevoluciuloj, ekipitaj kaj ekzercitaj en eksterlando, tutaj armitaj formacioj estis transigitaj sur la teritorion de Afganio. Fakte la imperialismo kune kun siaj helpantoj komencis neproklamitan militon kontraŭ revolucia Afganio.

La afganistana popolo insiste postulis, ke oni ĉesigu la agreson, ke oni donu al ĝi la eblecon konstrui trankvile novan vivon. Kontraŭstarante la eksteran agreson la afganistana registaro jam ĉe la prezidanto Taraki kaj ankaŭ poste nefoje petis helpon de Sovetunio. Niallanke ni avertis, ke se oni ne ĉesigos la agreson, ni ne lasos la af-



ganistanan popolon en malfeliĉo. Kiel sciate, ĉe ni la vortoj koincidas kun la faroj.

La agoj de la agresuloj kontraŭ Afganistano estis faciligitaj de Amin, kiu, uzurpinte la regpotencon, komencis kruelajn reprezaliojn kontraŭ la popolamasoj, kontraŭ la partiaj kaj militistaj kadroj, kontraŭ la reprezentantoj de la intelektularo kaj la eklezio — t. e. kontraŭ la socitavoloj, sur kiuj apogis sin la aprila revolucio. Kaj sub la gvido de la Popoldemokratia Partio frunte kun Babrak Karmal la popolo levigis kontraŭ la tiraneco de Amin kaj renversis ĝin. Hodiaŭ en Vaŝingtono kaj en kelkaj aliaj ĉefurboj oni ploras pri Amin. Tio aparte bone senmaskigas ilian hipokritecon. Kie estis tiuj ploristoj, kiam Amin organizis amasreprezaliojn, kiam li perforte flankenigis kaj senleĝe fizike neniigis Taraki — la fondinton de la nova afganistana ŝtato?

Venis momento, kiam ni ne plu povis ne respondi al la peto de la registaro de amika Afganistano. Agi alimaniere — tio signifus lasi Afganistanon esti disŝirita de la imperiismo, permesi al la agresfortoj ripeti ĉi tie tion, kion ili sukcesis fari ekzemple en Ĉilio, kie la libero de la popolo estis dronigita en sango. Agi alimaniere, tio signifus rigardi pasive, kiel ĉe nia suda limo kreigas fajrujo de serioza minaco kontraŭ la soveta ŝtato.

Adresante sin al ni Afganistano agis konforme al la klaraj paraĝrafoj de la kontrakto pri Amikeco, Bonnabareco kaj Kunlaboro, subskribita inter Afganistano kaj Sovetunio en decembro 1978, konforme al la rajto de ĉiu ŝtato pri individua kaj kolektiva sindefendo — rajto, kiun aliaj ŝtatoj neofte aplikis. Tiu rajto estas konforma al la Statuto de UN.

La nura tasko, starigita antaŭ la sovetaĵ trupoj, senditaj al Afganistano, estis helpi tiun landon forpuŝi la eksteran agreson. Ili estos plene retiritaj el Afganistano, kiam malaperos la kaŭzoj, kiuj igis la afganistan registaron peti ilin.

Absolute trompaj estas la asertoj, ke Sovetunio havas iajn planojn de ekspansio kontraŭ Pakistano, Irano aŭ alia lando en tiu regiono. Al ni estas fremda la politiko kaj la psikologio de la koloniistoj. Ni ne strebas al fremdlanda tero, ni ne sopiras pri fremdaj riĉaĵoj. Laodoro de petrolo altiras ĝuste la koloniistojn.

Paroli pri „soveta minaco kontraŭ la paco“ kaj agi kiel gardantoj de la internacia moralo — tio estas pure fariseaj provoj de tiuj, en kies dosiero estas enskribita „la malpura milito kontraŭ Vjetnamio“, tiuj, kiuj eĉ fingron ne movetis, kiam la ĉinaj agresuloj entreprenis armitan invadon en socialisman Vjetnamion; kiuj jam dekojn da jaroj posedas militbazon sur la teritorio de Kubo kontraŭ la volo de ĝia popolo kaj registaro;

kiuj tintigas armilojn, minacas per blokado, efektivas malkaŝitan militpremon kontraŭ la revolucia irana popolo, sendante al la bordoj de Irano grandan floton, ekipitan per atomarmiloj.

Sed tio, ke Vaŝingtono memvole uzurpas la „rajton“ „premi“ aŭ „puni“ sendependajn suverenajn ŝtatojn starigas principan demandon. Per similaj agoj la registaro de Usono fakte donas baton sur la ekzistantan internacian juran sistemon de rilatoj inter la ŝtatoj.

Mi ripetas: ni estas por intertraktoj, sed honestaj, egalrajtaj, konforme al la principo de egala sekureco.

Ni rigardas kun optimismo al la estonteco. Ni scias, ke la volo de la popoloj faris tra ĉiuj bazoj la vojon de tiu direkto en la mondaferoj, kiu plene esprimigas per la vorto „malstreĉeco“. Tiu ĉi politiko havas profundajn radikojn. Ĝin subtenas potencaj fortoj, kaj ĝi havas ĉiujn eblecojn resti gvida tendenco en la rilatoj inter la ŝtatoj.



SUKCESA 6A VARE EN KUBRAT

Sesaj fojoj en Kubrat okazis Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE). Ĝin partoprenis ĉ. 150 e-istoj el 9 bulgaraj distriktoj, el Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.

Je la nomo de UK de BKP kaj la Urba Popola Soveto la renkontiĝon salutis k-do Janko Velikov, postsekretario de reprezentantoj de BEA kaj la frataj E-asocioj.

„Esperanto — lingvo de paco kaj internacia amikeco“ estis la temo, pri kiu parolis bulgarlingve ĉe la inaŭguro antaŭ e-ista kaj nee-ista publiko k-do Kunco Valev, sekretario de BEA. Belegan programon prezentis la 120-membra artensemblo de la kulturdomo. La lerta dancado, belega kanto kaj buntaj kostumoj de la ensemblo ĝuigis la tutan publikon.

Post la inaŭguro la publiko vizitis la aranĝitan en la antaŭsalono artan foto-ekspozicion „Bulgara renesanca arkitekturo“ de s-ano Enco Balanov el Gorna Orjakhovica. Ĝia eduka valoro estis alte taksitaj de ĉiuj.

La programo daŭris per komuna vespermanĝo, amika kunesto kaj amuzado en restoracio.

Dimanche antaŭtagmeze komenciĝis E-seminario. Unue prelegis s-ano Drahomir Kočvara el ĈSSR je temo „Esperanto kaj mondaj pacforumoj“. La seminario akceptis protestan leteron al la USA-ambasado kontraŭ la instalo de novaj raket-nukleaj armiloj en Okcidenta Eŭropo. Specialan gratulleteron oni sendis al la honora prezidanto de MEM k-do Nikola Aleksiev, esprimante dankon pro lia altvalora pagado.

Pri la dua temo de la seminario — „Esperanto kaj monda turismo“ — prelegis amiko Mihail Kucin el Košice, ĈSSR.

Post la fermo laŭ tradicio la gastoj kaj dommastroj vizitis la arbardomon apud la urbo.

Ĝis revido dum la 7a VARE sekvontjare lastsabate januare!

Anton Antonov

ANTAŬKONGRESA AKTIVECO EN LA SOFIA DISTRIKTO

Januare en Etropole kaj Botevgrad — proksimaj unu al la alia urboj de Sofia Distrikto, estis organizitaj per la helpo de la Sofia Distrikta Estraro kaj la lokaj Komsomolorganizoj kvar propagandaj priesperantaj kunvenoj. En ĉiuj pri la temo „Esperanto — lingvo de paco kaj internacia amikeco“ parolis k-ĉo Kunĉo Vălev, sekretario de BEA kaj ĉefredaktoro de „BE“.

En Etropole la kunvenoj okazis en salono de la bela popola legejo. La unuan ĉeestis ĉ. 200 ĝenerantoj el la mezlernejoj de la urbo. En la dua ĉeestis junuloj kaj civitanoj, ĉ. 50 personoj. En la kunvenoj estis projekciitaj koloraj diapozitivaj pri Islando — lando de la kontrastoj kaj de la 64a UK de E-o. Bonan akompanan tekston faris k-ĉo Mihail Sekerĉiev, partopreninto en la 64a UK.

La rezulto: kurso por komencantoj sub la gvido de k-ĉo Temenujka Ovĉarova. Surbaze de tiu kurso revivigos la preskaŭ morta E-societo „Kamarade“.

En Botevgrad la kunvenoj okazis en la komsomola klubo. Denove estis projekciitaj la samaj diapozitivaj, ĉifoje kun akompana teksto de K. Vălev. La publiko — sume ĉ. 60 personoj. Tuj post la kunvenoj komenciĝis elementa E-kurso sub la gvido de k-ĉo Vanko Bărdarov kun ĉ. 30 partoprenantoj. Surbaze de tiu ĉi kurso oni refondos la E-societon en la urbo, delonge mortinta.

En ambaŭ urboj la ĉi-supra aktiveco estas dediĉita al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj. Ni kredas, ke ĝi estas la komenco de nova E-movado en tiu regiono.

GRAVA ALVOKO

Okaze de la 110a naskiĝtago de V. I. Lenin E-societo „Kolombo de la paco“ organizos letervesperon kun ekspozicio pri Lenin. Ĝi petas ĝemikojn diverslandajn sendi fotojn de domoj, kie loĝis Lenin, de muzeoj, uzinoj, stratoj, lernejoj je lia nomo, ankaŭ librojn, memoraĵojn pri li aŭ nacilingvajn artikolojn de homoj, persone konintaj lin. Rekompenco certa.

Ni serĉas daŭran kontakton kun E-kluboj en ĉiuj landoj. Nia adreso: Esperanto-societo „Kolombo de la paco“, str. „Stara planina“ 12, 6290 Găldobovo, Bulgario.

ESPERANTA TENDARLERNEJO APUD DRUJEVO

Venu lerni Esperanton kaj ripozi en saniga kaj pitoreska loko en Stara Planina (Balkano) apud v. Drujevo. Ekde du jaroj la kondiĉoj en la tendarlernejo estas grave plibonigitaj: novaj komforte ekipitaj bangaloj, varma akvo, bonkvalita nutrado.

En la kuranta jaro la grupoj estos:

- | | |
|----------------------|------------------------|
| 1) 2. VI — 15. VI | 5) 2. VIII — 15. VIII |
| 2) 17. VI — 1. VII | 6) 17. VIII — 30. VIII |
| 3) 3. VII — 16. VII | 7) 1. IX — 14. IX |
| 4) 18. VII — 31. VII | |

En ĉiu grupo estos E-liktoro. Oni lernas, kantas, promenadas, ekskursas, ludas, amuziĝas.

Apartaj personoj estas akcepteblaj ankaŭ ekster la grupoj, se estas libera loko.

Kotizoj: por lernantoj kaj studentoj 35 levoj
por civitanoj 40 levoj

Sumojn sendu al: DS Kasa Blagoevski rajon, smetka 185/2553 na Esperantsko Oĝrajno-Grudsko Răkovodstvo, Sofia.

VOJO AL SUKCESO

Antaŭ kvar jaroj mi fariĝis oficisto en la administra fako de la Ĉefa administrejo „Hidrologio kaj Meteorologio“ en Sofio. Ĉe tiu oficejo estas ankaŭ scienca instituto. En ambaŭ laboras multe da oficistoj, laboristoj kaj sciencistoj.

En januaro 1978 mi pendigis afiŝon pri kurso de E-o. Dufoje mi disaŭdigis anoncon pri la kurso per la ofica radiostacio. La rezulto estis nula. Nur du personoj petis pliajn informojn, sed ekscinte, ke la kurso ne okazos en nia oficejo, ili ne emis viziti ĝin. Tia malsukceso povas vaporigi la optimismon eĉ de granda entuziasmo, sed tamen mi persistis.

Antaŭ ol daŭrigi la klopodojn mi analizis la situacion. Kaj la konkludo estis, ke mi devas ŝanĝi la taktikon, ne la strategion. Unue mi volis montri al la potencialaj e-istoj la praktikan valoron de E-o kaj nur poste organizi kurson. Por atingi tion mi aranĝis ekskurson al Pollando, kie estis tiom sukcesa, ke tiuj, kiuj hezitis kaj ne aliĝis, ege bedaŭris. La partoprenantoj en la ekskurso konvinkigis pri la praktika valoro de E-o. Pri siaj pozitivaj spertoj ili rakontadis al siaj kolegoj kaj petis okazigon de kurso.

La kurson mi gvidis dum kvar monatoj. La lecionoj okazis en labortempo, same kiel la lecionoj de diversaj naciaj lingvoj. La kursanoj diligente lernis, skribis, konversaciis kaj kantis. Dank'al la lernado de E-o ili fariĝis pli bonaj amikoj. Ne mankis promenadoj, ekskursoj, vizitoj de teatro kaj kino, reciprokaj gastadoj.

El 25 aliĝintoj sukcese finis la kurson 20. Inter ili estas kelkaj sciencistoj. Je la fino ni organizis koktelon, kiun ĉeestis gvidantoj de la oficejo, de la Instituto kaj de Bulgara E-Asocio. Sidante ĉe la tabloj inter siaj gastoj, la novaj e-istoj kantis, deklamis, babilis.

Mi klopodis liveri al la novaj samideanoj adresojn de samfakuloj el eksterlando. Nur en la jarlibro de UEA mi trovis tri konvenajn adresojn. La anonco en la gazetaro restis senrezulta. Evidentiĝis, ke nia movado preskaŭ ne kulturis tiun ĉi terenon. Tamen mi daŭre persistis. Ĉi-jare mi fondis ĉe la oficejo kaj la Instituto klubon „Esperanto“. Ĝi pretigis varian kaj interesan jaran planon de agado. Nun mi gvidas novan kurson por komencantoj. Versajne post ĝi povos okazi ankaŭ kurso por progresintoj. Estas planitaj kelkaj enlandaj kaj eksterlandaj ekskursoj. Ni intencas viziti ankaŭ kolegojn en eksterlando por pretigi favoran situacion por okazigo de nova E-kurso.

Nun ĉiuj en mia oficejo parolas pri E-o kun estimo. Nenia primoko kaj kontraŭstaro.

Mi surpaperigis mian E-agadon en mia oficejo ne por fanfaroni. Mia nura celo estas per faktoj pruvi al tiuj aktivuloj, kiuj ofte

LA VERDA STELETO BRILAS EN NORDOKCIDENTA URBO VIDIN

En la fama banloko Bankja (distrikto Sofio) funkcias E-societo „Solidareco“. Antaŭ pli ol 15 jaroj laŭ propono de la tiama prezidanto Georgi Trojanov la komunumo nomis straton „Esperanto“. Multaj jaroj tamen inter la loĝantoj de la strato ne estis e-istoj. Ekde du jaroj la internacian lingvon komencis lerni Zlatko Rangelov kaj Boris Popov, loĝantoj de tiu strato.

Laŭ ilia iniciato estis aranĝita festo omaĝe al la nomo de la strato. Fine de januaro en konvena salono kolektis preskaŭ ĉiuj familioj. Ĉiuj portis bongustajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por komune vespermanĝi kaj amuziĝi.

La festo komenciĝis per prelego de la instruisto Boris Simeonov el Sofio. En la pasinta somero li vizitis kelkajn mez-azian respublikojn de Sovetunio. Nun li rakontis pri siaj renkontigoj kun e-istoj el Samarkand, Tashkent, Alma-Ata. La prelego „Uzbekistano — antikva kaj hodiaŭa“ estis ilustrita per 50 lumbildoj. Ĝi vekis viglan interesiĝon ĉe la loĝantoj de strato „Esperanto“. La fakto, ke deko da civitanoj — junaj kaj mezaĝaj — anoncis sian deziron lerni la internacian lingvon, pravas la rezulton de la spontana vespera solenaĵo. Notinde estas, ke la feston ĉeestis ankaŭ Hristo Jankulov — prezidanto de la urba Komitato de Patrolanda Fronto, kaj aliaj societanoj. En sia salutparolado Jankulov speciale esprimis kontenton de tiu originala manifestiĝo de socia solidareco. Interalie li diris: „Ni komprenis la valoran laboron de la e-istoj per plialtiĝi la kulturajn atingojn de nia loĝantaro. Ni devas helpi tiun agadon, ĉar ĝi plene koincidas kun la nobla ideo de nia socialisma socio“.

Stama Vasilleva

Longan tempon en Vidin oni preskaŭ ne parolis pri la E-movado, ne estis junaj e-istoj, la malnovaj e-istoj ne estis bone organizitaj.

La 22a de decembro 1978 estis neforgesebla tago. Tago de fondiĝo de junulara sekcio ĉe E-societo „Esperanto“. Komenciĝis nova vivo — forta, sana, entuziasma!

Multe da laboro, kunvenoj, partopreno en regionaj renkontigoj, en konferenco de ĝemelaj urboj el socialismaj landoj en U. Sverin (GDR), en nacia mezlerneja laborbrigado en U. Jambol, internacia junulara E-laborbrigado en U. Bekeŝaba (Hungario).

Multaj estas la plenumitaj punktoj el la programo por 1979. Oni povus rakonti pri la E-ekspozicio, organizita en la Distrikta Junulara domo okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Pri la vespero, dediĉita al nia ĝemela urbo Sverin.

„Sverin kaj Vidin estas du fratoj! Du urboj ĝemeloj! Du urboj, kiuj man' en mano marŝas sur la vojo, montrita de du titanoj — Dimitrov kaj Telman — la vojo de la komunismo!“

Tiuj vortoj emocias niajn junajn korojn. Ili estas naskitaj el tio, kion la homoj nomas amikeco!

La leteroj flugas de Vidin al Sverin, de Sverin al Vidin — amikaj, varmaj! Salutleteroj, donacoj al niaj ĝemeloj okaze de ilia plej granda festo — la 30-jariĝo de GDR.

Ankaŭ protestaj kunvenoj kontraŭ la rasa apartismo, kontraŭ la ĉinaj agresuloj en la vjetnama lando k. a. Du disaŭdigoj per la loka radio, raportajetoj en la loka ĵurnalo „Ruga Standardo“.

Nia laboro estis kunordita kun E-societo „Esperanto“, la Urba Komitato de Komsomolo kaj la Junulara Domo, kiuj bone helpis nin.

Kaj ĉion ĉi — por unu jaro!

Fine de decembro 1979 en la klubo de internacia amikeco en la Distrikta Junulara Domo okazis nia unua jara konferenco.

Ce la unuaj akordoj de la himno de l'esperantistoj ĉiuj ekstaris. Tiel komenciĝis la konferenco.

Granda slogano „Per Esperanto al paco“ ornamis la klubejon. Tri flagoj pendis de la muro — la bulgara trikoloro, la verda E-flago kaj la flago de la Sverina E-klubo.

La agadraporto parolis pri ĉio — sukcesoj kaj nesukcesoj, planoj kaj ties realigo. Ni tute ne kaŝis ankaŭ niajn erarojn. Sekvis vigla diskutado, akcepto de nova programo por 1980.

Je la fino la gastoj el la Urba Komitato de Komsomolo, el la Junulara Domo kaj la prezidanto de la urba E-societo gratulis la junajn e-istojn pro ilia sukcesa laboro dum 1979 kaj certigis nin, ke estontece same helpos nin ĉe ĉiu iniciato kaj aranĝo.

La konferenco finiĝis per la kanto „Verda estas“. Sekvis la dua parto — amuzvespero. La verdaj steloj sur la brustoj de la partoprenantoj pli ĝoje ekbrilis.

La programo 1980 tuj komencis realiĝi: 22 el la membroj de nia sekcio jam partoprenis la novjara E-semajnon en Budapeŝto.

Ni, la membroj de la junulara sekcio de E-societo „Esperanto“ en Vidin, deklaras, ke nian 40an jubilean kongreson ni renkontos kun multaj novaj sukcesoj sur la Verda E-kampo!

Verjinija Dokova

plendas pro manko de intereso al E-o inter la publiko. Evidente oni devas ŝanĝi ne la strategion, sed la taktikon. Oni devas agi laŭ la lokaj cirkonstancoj. Tio estas certa vojo al sukceso kaj venko, pri kiu ni multe parolas, sed malmulton sukcesas fari.

Mi forte esperas, ke tiu ĉi artikolo interstigos landajn kaj lokajn E-organizaĵojn ekagi inter hidrologoj kaj meteorologoj. Tiamaniere post kelkaj jaroj ni havos sufiĉe da e-istoj en tiu medio kaj fariĝos ebla komenci eldonadon de faka literaturo kaj revuo kaj okazigi internaciajn E-renkontigojn kaj seminariojn por tiaspecaj specialistoj kaj sciencistoj.

Jen nia adreso por kontaktoj kaj kunlaboro: Ĉefa administrejo „Hidrologio kaj meteorologio“, klubo „Esperanto“, bul. „Lenin“ 66, 1113 Sofio, Bulgario.

Nikola NIKOLOV

Entuziasme gvidas elementan E-kurson en la Junulara Domo Verjinija Dokova, Vidin.



LITERATURA VESPERO PRI HRISTO GOROV

La 23an de januaro la Sofia E-Societo „M. Gorkij“ aranĝis literaturan vesperon dediĉe al Hristo Gorov.

Biografiaj skizoj kaj literaturan portreton de Gorov faris Kunco Vălev. Li substrekis, ke ĉio ĉe Gorov estas en plena harmonio — vivo, ideologio, sociagado, socibatalo kaj literatura verkaro. Ĉar li estas honesta civitano, monolita personeco kaj firme konvinkita revoluciulo-marksisto.



Naskita kaj kreskinta en malrica laborista familio de fuĝintoj el Macedonio, Gorov tre frue, jam knabo, ekmarŝas la vojon de la miloj de ekspluatitoj kaj subpremitoj ĉe la kapitalismo. Tio nature ligis lin kun la laborista klaso, faris lin konseca batalanto por nova vivo, por socialismo. Dum la plej akra kontraŭfaŝisma batalo li farigis gvida funkciulo de la Bulgara Komunista Partio, membro de ĝia DK en Plovdiv. La popola venko je la 9 de septembro 1944 trafis lin partizano. Post la liberigo li dediĉis sin al vigla socia kaj kultura agado.

Paralele kun sia aktiva socia batalo Gorov frue komencis verki en bulgara lingvo kaj en E-o. Ĉefaj motivoj de lia verkaro estas la sociaj. Li priskribas la revoluciajn batalojn de nia popolo kontraŭ la burĝa sociordo kaj la imperialisma milito, por amikeco kun la frata sovetia popolo. Firma kredo je la popola venko estas karakteriza trajto de la tuta verkaro de Gorov.

Sub lia plumo aperis kelkaj bulgarlingvaj libroj, plejparte rememoroj de la aŭtoro el la kontraŭfaŝisma batalo. Jen kelkaj titoloj: „Tiel pereis la politika komisar“ (romano), „La vojo al la venko“ (raportoj), „Gismorte fidelaj“, „Tunelo sub la malliberejo“ (rememoroj), „Kroniko de unu somero“ (partizana taglibro), „En la ombro de la giloto“, „Montaraj agloj“ k. a. En sia lasta libro — „Mi ŝatas la verdecon de mia naskiĝloko“ — Gorov faras skizon de la fidele popola filo Metaksa Guginski — elstara anti-faŝisto kaj arda esperantisto.

Ciuj ĉi libroj riĉigas la rememoran literaturon de Bulgario. Ili estas pura fonto de patriotisma kaj internaciisma edukado, edukado en spirito de amo kaj fideleco al la popolo, al ĝia batalo por libera kaj socia justeco, por socialismo.

Multan tempon dediĉis Hristo Gorov al la ĵurnalis-

tiko. En Plovdiv li redaktis bulgarlingve „Udarnik“ (Avangardo). — organo de la DK de la Laborista Partio, kaj esperantlingve j. „Sturmulo“, pro kio li estis ĵugita de la burĝa tribunalo kaj kondamnita je mallibereco. Pli ol du jarojn (1935—37) li restis en la malliberejo. En 1943 Gorov komencis redakti j. „Oteĉestven Glas“ (Patria Voĉo) — organo de la eksterlega tiutempe Patrolanda Fronto. Kiel partizano li redaktis la periodaĵojn „Ĉetniceŝka Borba“ (Taĉmenta Batalo) kaj iom poste „Partizanska Borba“ (Partizana Batalo). Abundas liaj pseŭdonimoj, sub kiuj aperis liaj artikoloj, raportoj, felietonoj, versaĵoj k. a. en tiuj mallegalaj eldonaĵoj: Hrima, Zarko, Slavjanski, Tr. Lipoev, Minko Brezovski, Katjuŝin k. a.

Dum la 30aj jaroj Gorov aktive kunlaboris al centraj sofiaj ĵurnaloj kiel „Zarja“ (Cielruĝo), „Novini“ (Novajoj), „Sofija“ k. a. Post la popola venko li longe estis ĉefredaktoro de j. „Oteĉestven Glas“ (Patria Voĉo) — organo de la DK de BKP en Plovdiv. Apartan lokon en la verkaro de Hristo Gorov okupas liaj E-verkoj. Fortan influon tiudirekte havis sur lin la flama E-poeto Julio Baghy kaj la sovetaj E-poetoj Nikolao Hohlov, Eugeno Mihalski, ankaŭ la estona E-poetino Hilda Dresen, la germanaj Ludvig Ren kaj Marija Henkel ka. La pli granda parto de la E-verkoj de Gorov kuŝas en diversaj E-periodaĵoj el la komenco de la 30aj jaroj: „Balkana Laboristo“, „La Nova Epoko“, „La Nova Etapo“, „Verda Stelo“ de Teo Jung, „Internaciisto“ — organo de la Internacio de Proletaj E-istoj (IPE), „Proleta Studento“ (la junulara eldono de IPE), „Esperanto“ de UEA k. a. Libroforme aperis la poemo „Post la fronto“, „Poemo de la plugisto“, „La abismo“ (rakontoj), „Du frontoj“ ka. Libroforme (en du diverstempaj eldonoj) aperis ankaŭ lia (kun David Sasonov) traduko de la fama revolucia poemo „Septembro“ de Geo Milev. Dum la lastaj jardekoj multaj skizoj pri elstaraj anti-faŝistoj-esperantistoj kaj poeziaj verkoj de Gorov aperis en revuo „Bulgara Esperantisto“.

La bulgara E-movado fieras, ke ĝi donis al la internacia revolucia E-movado tian dignan literaturan kreanton kiel Hristo Gorov — la prezidanto de BEA.

Post la prelego de K. Vălev estis plenumitaj poeziaj kaj prozaj verkoj de Gorov fare de Belka Beleva, Vera Văjarova, Vasja Petrova, Miŝo Zdravev, Kunco Vălev. S-ano Dimitro Denĉev tralegis originale verkitan versaĵon dediĉitan al k-do Gorov.

VAZOV EN ANGLA PERE
DE ESPERANTO

En la pasintjaraj E-kursoj en Barlaston, Anglio, organizataj ĉiujare de d-rino Marjori (Marjorie) Boulton, kiel niaj legantoj jam scias, laboris ankaŭ s-ano Rajna Konstantinova. Interalie ŝi faris ankaŭ prelegon pri nia nacia poeto Ivan Vazov, recitante kelkajn el liaj poemoj, tradukitajn en E-on de Simeon M. Simeonov. La poemoj tre plaĉis al la publiko. S-ano Kathleen Hall elektis la versaĵon „Kie estas dio?“ kaj tradukis ĝin en anglan. Ambaŭ tradukoj — la esperantlingva kaj la anglalingva — aperis en la lasta (nov.-dec. 1979) n-ro de revuo „Brita Esperantisto“, organo de Brita E-Asocio.

Tio estas interesa okazo pri uzado de E-o kiel pontolingvo por kulturaĵo celoj.

INTERNACIA TAGO DE LA VIRINO

LITERATURA AKTIVECO DE NIAJ SAMIDEANINOJ

Penka Papazova

MI SERĈIS...

Mi serĉis stelon sur la ĉielo,
kiu nur por mi brilos...
Mi serĉis floron en la kamparo,
kiu nur por mi floros.
Sed sur la ĉielo estis nebulo,
kaj mi ne vidis la stelon...
Sur la kamparo estis frosto,
kaj mia floro ne floris.
Nun la tago pentras
la ombron de mia am'.
Mi iras antaŭ la ombro...
Paŝo post paŝo
la suno subiras.
Paŝo post paŝo
la ombro longiĝas.

Nadia Andrianova,
Kiev

ESPERO

Dum tuta vivo
homa kor' esperas
je bona sorto, amo kaj feliĉo
kaj pene agas,
luktas kaj suferas.
Esper' kaj revoj
por la koro estas
dum tuta vivo
la plej granda riĉ'.
Ĉar kiam homo
perdas la esperon,
li perdas fakte
ĉion en la viv'...

LA NASKIĜTAGOJ

Delonge la naskiĝtagoj
gojon ne portas —
jam amasiĝis la jaroj...
Sed mi ĉiam al la fonto revenas,
por havi fortojn
denove ekiri...
Ne estas grave,
ke en vintro mi vagas.
Kie mi pasis,
restas vojetoj...
Sed ĉiam nova restas
la vojetoj
al la koro!



Blaga Dimitrova

DEZERTOJ

Estas mi naskita ami
kaj amata esti,
sed forpasis mia vivo
preskaŭ sen amoro...
Tial ĉion mi pardonas.
Ne akuzas mi
la dezertojn nudajn,
kiujn mi trapasas.
Nur demandas ilin mi
per rigard' mirigita:
ĉu ne por ĝardenoj ho,
estas vi naskitaj?
El bulgara:
Cvetanka Adamova

Elena Popova

VJETNAMIO

Tero kiel la arbaroj verda
kaj vitala,
kun interplektitaj branĉoj
simile al frataj brakoj
en batalo,
kun silenta falo
de venenaj trunkoj kaj folioj...
El arbaroj viaj kaj el valoj
venis nur la ĝemoj kaj la krioj
de la malamikoj.
Tero — varma platpano, knedita
de lertaj manoj,
kiel en fabel' gardita
kontraŭ buŝo de drakono,
kaŝe donanta al infanoj siaj
kun la panja lakto
feran forton kaj ardecon,
naskanta heroojn
por pezaj bataloj
kaj laboroj ordinara.
Peceto da tero, kiun oni provis rompi,
plugadis per bomboj,
surverŝis per veneno,
semis per kugloj...
Sed ĝi ekstaris el la cindro,
banita en la sango de siaj idoj...
Kaj fruktigita de la venko,
restos por ĉiam!

Inita Tamošunienė

VOKO

Naskiĝis mi en kvardek kvina jaro.
En fino de aprilo. Dum milit'.
En akuŝejo kune kun bebaro
kriegis mi kuŝante en la lit'.
Ne sciis ni, ke nia tero brulas,
ke estas forgesita humanec'...
Nin nokte
fora kanonado lulis
en la komenzo de la infanec'.
Sur ter'
ankoraŭ eksplodadis bomboj,
kaj sonis ĝemoj, ploro, kri' sen fin'.
Sur tero
abundegis
freŝaj tomboj,
sed tio tute ne koncernis nin.
Kaj ne konante la militan flamon,
sed laŭ denaska rajto per la kri'
ni postulegis, malgraŭ ĉio! — amon.
Ĉiaman pacon postulegis ni.
... Aŭskultu tra la tuta tersurfaco —
ankoraŭ sonas memoriga vok':
infanaj voĉoj — gardu pacon, pacon,
ĉar maltrankvila estas la epok'!

LA INTERESA LIBRO DE K-DINO VECEVA

S-anino Hristina Veceva, instruistino en Samokov, skribas interesan libron. Libro pri la vivo de la E-societo en la urbo. Libro pri homoj kaj eventoj. Sed antaŭ ol paroli pri tiu originala kaj valora iniciato ni deziras prezenti s-aninon Veceva mem.

Si fariĝis e-istino en 1959. Tuj arde ŝi akceptis E-on, kvazaŭ tutan vivon ĝin serĉis. Jam de la komenco ŝi aktive partoprenas en la vivo de E-societo „Rila Esperantisto“. Si bone ellernis la lingvon kaj ĉiam pli perfektigas siajn lingvokonojn. Baldaŭ ŝi fariĝis animo de la E-societo en Samokov. La e-istoj komencis pli ofte kolekti kaj kunveni, organizi diversajn arangojn. Ŝiekgvidis E-kursojn.

Veceva proponas kaj efektivas diversajn iniciatojn: renkontigojn en la domoj de e-istoj, kie oni babilas, ŝercas, kantas kaj interalie formanĝas ion, speciale preparitan — kukon, maizajon, kukurbon k. a. Aŭ tion faras gaste ĉe sia amiko en la apudurba vilaĝo Dospei.

Multan laboron faras Hristina Veceva por la organizado de la jam tradiciaj regionaj renkontigoj de la e-istoj el Sudokcidenta Bulgario. Por tiuj renkontigoj la E-societo en Samokov devas organizi ne nur kunvenon, sed ankaŭ prepari belartan programon, prizorgi ekskurson k. a.

Ofte Veceva respegulas la E-vivon en la loka ĵurnalo „Samokovska Komuna“. Menciante la nomojn de samideanoj, kiel Hristina Veceva, mi pensas pri la sorto de ĉiu movado, pri ties progreso, kiu ne estus ebla sen la sindona kaj efika laboro de apostoloj.

Kaj nun — pri la libro. Veceva komencis skribi ĝin en januaro 1960. Sur la unua paĝo oni legas la penson de Ivan Vazov: „Esperanto estas la plej perfekta ĝis nun

artefarita lingvo, kreita por proksimigi la homaron kaj fari al ĝi pli alireblaj la komunajn kulturajn valorojn.“ En la komenco de la libro estas portreto de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.



Sekvas biografiaj notoj pri pli ol 20 samokovanoj — ardaĵ adeptoj de E-o. Oni povas vidi, kiel ili fariĝis e-istoj, kion ili laboris kaj faris. Jen la tuta societo gastas en aprilo 1971 en la domo de sia fondinto, la veterano Josif Vaklinov — la unua e-isto en Samokov. Jen renkontigo inter e-istoj de Ihtiman, Samokov, Sofio k. a. Jen E-ekskursoj, ĝis la rilaj montopintoj Musala, Meĉit, Sokolec, ekskursoj ĝis Batulija, ĝis Pleven. Jen la 39-a kongreso de la bulgara e-istoj en Ruse 1976.

Multaj tekstoj estas akompanataj de bonaj fotoj, dislokitaj en la libro tre estetike. Oni povas vidi ankaŭ diversajn invitojn pri aranĝoj, kiujn partoprenis la societanoj. Lokon havas ankaŭ la jubileo de eminentuloj. Kiel bonega memoraro estas la gastado de samokovanoj en Hungario en 1971. Kor-

tuŝe estas priskribitaj renkontigoj kun samideanoj el Ĉeĥoslovakio, el Vjetnamio, Japanio. La japanoj donacis al siaj bulgaraj amikoj paron da majstre ellaboritaj pantofloj kaj line skribis: „Ni eĉ deziras resti eterne kun vi!“

En la libro oni povas vidi foton pri E-konferenco de Sudokcidenta Bulgario — 25. V. 1930 j. en Sofio. Alia — el la vivo de la societanoj en 1928 j. Kaj en fotoj ankaŭ estas „Nia espero, nia estonto“ — la E-junularo de Samokov.

Sub ĉiuj fotoportretoj estas skribita la nomo de la fotografito. Tiel en la libro oni povas vidi la tutan vivon de la E-societo en Samokov. La libro montras unu historion, montras la fortojn de la E-agantoj, la atmosferon, en kiu vivas la societanoj. Ĝi estas ne nur protokola dokumento, sed la vivo mem, kun ĝiaj malfacilaĵoj, penoj kaj ĝojoj. Ĝi restos por la homoj de la estonto, kiuj tie povos vidi la flamon, la revojn de siaj geavoj apostoloj, sen kiuj ne povus marŝi antaŭen nia bulgara E-movado.

Tiu libro estas imitinda afero. Post jaroj, kiam nia movado pligrandigos, ĉi tuta materialo vekos grandan interesecon. Tiam tia libro havos novan valoron. Ĝi estos historio, ĝi estos dokumento, fonto, el kiu la estontaj aktivuloj ĉerpos ekzemplon, fortojn! Ĝi estos atesto pri la penado, per kiu la e-istoj veteranoj kreis la movadon, pri ilia amo kaj sindonemo, pri iliaj revoj kaj esperoj. . .

Tian libron oni devas rekomendi al ĉiu E-societo. Eĉ postuli ĝin. Ĝi povas esti skribita de ĉiu konscia e-isto.

Neniu alia povas kaj devas krei kaj gvidi antaŭen nian karan E-movadon, krom la e-istoj mem.

Dimitro DENČEV

CIKONIAJ LEĜOJ

Malgranda vilaĝeto konturiĝis ĉe la piedoj de Stara-planina (Balkano), izolita kaj malproksima de aliaj loĝlokoj. Ĉirkaŭ ĝi estis herbokampoj, sur kiuj grave promenadis cikonoj. Okcidente de la vilaĝo zigzagis mirinda rivero kun argentaj akvoj, kiuj fajreris sub la suno.

La pura monta aero karesis tiun florplenan vilaĝeton. La kampa alaŭdo senzorge flugis kaj kantis, trapasante super la verdaj grenkampoj kiel tenera kareso.

Sur la kurbaj jam tegmentoj de la domoj, kovritaj per verdirantaj de la tempo tegoloj instalas sin la unuaj printempaj gastoj. Aŭdiĝis plaŭdo de flugiloj. Apud la plej proksima domo komenciĝis kruela batalo en la aero. Du grandaj cikonoj persekutis unu la alian, tuŝetis sin kaj denove komencis la persekuton. Finfine unu el ili malproksimiĝis, sed la alia plue persekutis ĝin. Forpelinte la rivalon, la edzo revenis al sia granda nesto, trovis la ĵus alflugintan in-cikonion, kiu antaŭ la batalo estis forkurinta por ne toleri la flirton de la neinvitita gasto. Komenciĝis terura disputo inter la geedzoj. Si staris humile klininte la bekon al la fundo de la nesto, silentema kaj timema. Sed la edzo frapis sur sin furioze kaj minace per sia beko. Si kurbiĝis ankoraŭ pli. Neatendite alflugis la rivalo. Denove komenciĝis ankoraŭ pli kruela batalo. Si observis ĝin, preskaŭ ĉesiginte la spiradon. Kiam la edzo forpelis la rivalon malproksimen, li eniris la neston kaj denove ekklakis per sia beko. La incikonio eble preferis sian morton ol la maljustan kulpigon. Sed jen li ĉesigis la klakadon kaj proksimiĝis tenere al ŝi. Sed ŝi levis la kapon, erkigardis silente kaj fiere forpuŝis lin. La sekvan momenton li denove atakis ŝin, ankoraŭ pli kruele.

Mi eksentis malbonhumoron pro tiu familia disputo kaj decidis reveni hejmen. Versajne mi staris sufiĉe longe, ĉar la proksima altaĵo jam estis jetinta sian lanugan ombron. Okcidente en la malproksimo ruĝa strio ankoraŭ tremis ĉe la horizonto. Iom post iom la blua sunsubiro vualis la tutan teron, kaj la nokto venis kun sia stela mantelo. Ĝidisverŝis odoron je freŝa herbo kaj kampaj floroj.

La sekvan tagon mi eliris frue por promeni preter la bordo de la rivero. En tiu momento la tenera malseka ventoblovo alportis al mi neordinaran bruon. Longe mi ĉirkaŭrigardis por kompreni de kie venas la bruo, sed nenion mi rimarkis. Trapasinte malgrandan altaĵon, mi ĉesis pensi pri la bruo, sed jen nevole mi ektemis. Antaŭ mi malkovrigis mirinda

bildo. En la malproksimo vidiĝis granda koliero el blankaj kaj nigraj grajnoj, kuŝanta sur la verda herbo. Meze de tiu mirinda koliero estis videblaj kelkaj dissemataj de ĝi grajnoj.

Preskaŭ ĉesinte spiri mi ekrapidis en tiu direkto. Ho, kia estis mia miro, kiam mi konstatis, ke la mirinda koliero estas la tuta cikonia generacio! La birdoj formis tute regulan rondon de kelkaj vicoj. Meze de la rondo staris (mi supozis) la plejaĝuloj aŭ la kondukantoj. Antaŭ ili — tri cikonoj. Unu el la plej aĝaj ekklakis forte per sia beko, respondis alia, post tio ekklakis multaj cikonoj — forte kaj longedaŭre. Estis neimagebla bruo, kiam ekklakis la tutaj vicoj, ĝis nun silentaj kaj senmovaj. La meza cikonio de la triopo forte tremis kaj klinis la kapon. Apenaŭ nun mi konjektis — eble tio estas la publika tribunalo de la cikonoj, kiu decidas la sorton de la triopo lige kun la hieraŭvespera skandalo.

Mi staris malantaŭ arbusto, tute kaŝita, kaj observis de proksime, preskaŭ ĉesinte spiri, la evoluon de tiu stranga kunveno. Mi ne memoras, kiom da horoj pasis. Fine mi vidis unu el la maljunuloj frapi la inan cikinion, post kio ĝi frapis la maldekstran birdon. Nur unu momenton — kaj la tuta herbejo transformiĝis en veran batakampon. Ĉiuj atakis la malfeliĉajn du cikonojn, gardante ian ordon, ne viditan de mi ĝis tiam. Oni frapis kruele la kulpulojn, kaj ili subigis sin al tiu kruela sorto, staris tutaj surverŝitaj de purpura sango. Tio daŭris ĝis kiam ĉiuj viciĝis ĉe sur la falintaj cikonoj, certe jam kadavroj. Proksime de mi ekflustris io. Tuj mi vidis iun cikinion alflugi malrapide, glate super la malbonaŭgura kampo. Altiginte, subite la birdo falis impete sur la proksiman rokon, kiu speguliĝis en la akvo de la trankvila argenta rivero. La roko havis akrajn pintojn, sed la cikonio malsupreniĝis sur ilin sen timo. Mi ekkuris tien, sed jam estis malfrue. Purpura sango ŝprucis el la granda kaj bela korpo, elradanta la lastan tremon de vivo.

Mi staris meze de la ŝtonegoj muta kaj konsternita. Miaj okuloj estis plenaj de larmoj. Jen ies paŝoj aŭdiĝis kaj mi turnis min. Al mi proksimiĝis kurbiĝinta maljunulo, avo Stojan, apogante sin per bunta bastono. Mi ekkuris al li plorante, kun la morta birdo en manoj.

— Avo Stojan, avo Stojan, mi petas! Klarigu al mi tion, kio okazis. . . Eble vi ĉion vidis.

(Sekvas sur p. 11)

PROFUNDE NACIA, PASIE PARTIA VERKISTO

La kreinto de „Bofilino“, „Datur“, „Tango“, „Ordinaraj homoj“... por ĉiam forlasis nin. La morto forprenis de ni grandan homon kaj verkiston, kiu estis fortika apogo por ĉiuj literaturaj laboruloj.

Ĉio ĉe Georgi Karaslavov konsternis nin, ĉar vere ĝi estis eksterordinare fortega kaj grand-skala. Li laboris en la socia kaj kultura agad-kampo kun la sama nehoma energio kaj aktiveco, kun kiuj li skribis siajn multvolumajn verkojn en ĉiuj beletraj, publikaj kaj dramaturgiaj ĝenroj. Neniam li konversaciis kun ni formale kaj apatie, ĉiam maltrankviligis, helpis nin per sincere emocia sindevigo, konsentis, enlogigis pasie kaj pasie agis, agis...

Enradikiĝinte profunde en la patrolandan teron, Karaslavov sensange kaj obstine defendadis siajn komunismajn principojn en la vivo kaj en la literaturo, okupadis pli ol ses jarkojn unu el la plej avanj lokoj de la batala socia kaj kultura vivo en Bulgario, pliriĉigadis per sia ĉiam aktiva asiduo la spiritan atmosferon de la literatura vivo.

Neordinaran forton radiis lia personeco de verkisto kaj sociaganto, ekstarinta firme sur la humgrundo, ekposedinta organike la marksisma-leninisman filozofion, transforminta la komunisman vivkoncepton en sian intiman homan kaj krea esencon. Ĉio en li estis tiel solida kaj neŝanceligebla, kvazaŭ li tutece estis elhakita el roko. Liaj sociopolitikaj konceptoj, liaj estetikaj principoj, lia partia pasio, lia neordinara, nature dotita talento estis tiel egaj kaj grandskalaj, kiel la epopeaj literaturbildoj de la popola vivo en lia matura verkaro.

Daŭr'ganto de la realismaj tradicioj, kreitaj de Karavelov, Vazov kaj Elin Pelin, Karaslavov estigis kvalite novan beletron, profunde nacia kaj pasie partia, en kiu li dominigis la novajn etikajn valorojn de la revolucia erao. Li dominigis ilin rigore kaj aŭtoritate

per sia karakteriza karaslavova elemento, kiu kvazaŭ ŝprucas rekte el la origina naturo, detruas kaj elradikas ĉiujn barilojn kaj obstaklojn en sia vojo. Lia tuta kreada disvolvigo ne konas la ideajn osciliojn, la suferigajn dubojn kaj disduigojn. Li sekvas rekte, neflanĝigante sian vojon de sobra realismo, de fidinda kronikisto de la popola vivo, de senkompata senmaskiganto de la burĝa moralo kaj de vera propagandisto de la komunismaj ideoj.

Lia riĉa kaj kompleta vilaĝana esenco frue estas organizita kaj subigita al la alta partia disciplino kaj bonmoreco. Kiel sindona batalanto de la partio Karaslavov neflakigante sekvas ĝian supreniran disvolvigon kaj rigas sian kreopovon per ĝia idea estetika platformo kaj profundaj nacia problemaro. Koncentrite li observas, diligente pristudas, esploras, analizas la movfortojn de la socia vivo kaj la profundojn de la homa animo; malkaŝas la sekretojn de la krimeco, malvireco kaj regreso; malkovras la fontojn de la pureco kaj la nobleco de la popola psiko, la radikojn de la heroeco kaj la revolucia patoso. Ĉiuj liaj verkoj estas konstruitaj sur riĉaj observoj kaj penetrantaj konoj pri la nuntempo. Li estas entute koncentrita sur la estanteco kaj enĝlutita de la fluantaj antaŭ liaj okuloj sociaj kaj psikaj procedoj, de la politikaj bataloj, en kiuj li senpere partoprenas, de la homoj, kun kiuj li rekte interrilatas... Kaj ĉie li serĉas aktualajn ideajn klarigojn kaj sagajn ĝeneraligojn pri la nacia karaktero.

Konsternantaj estas liaj konoj pri la popola vivo, pri la tuteca ekstera kaj interna mondo de la bulgara vilaĝo ekde la komenco de la jarcento ĝis niaj tagoj, pri la kruela nekortuŝebleco de la historiaj leĝoj kaj neŝanĝebla logiko de la tempo. Rigora kaj senindulge verama, drame maltrankvila kaj dialektike konflikta estas lia vasta krea mondo, en kiu la potenca minaca figuro de Jurlana — unu el la plej komplikaj kaj riĉaj literaturfiguroj en nia nacia beletra, kaj la malbonaŭgura ombro de Mariola kunestas egale kun la heroo staturo de Dimo Kazaka, de la multnombraj vilaĝaj laboruloj kaj fieraj batalantoj-komunistoj el la romano „Tango“ kaj el la romano-epopeo „Ordinaraj homoj“.

Foriris la lasta granda beletristo de la pasinteco, la klasikulo de la bulgara romano kaj rakonto, apartenanta al la generacio de la proletaj verkistoj de la 20aj kaj 30aj jaroj: foriris la granda, la eksterordinara persono, kiu jardekojn estis centro de nia nacia kultura kaj literatura vivo; foriris neordinara homo, kiu vekis en ni respekton kaj admiron. Restis lia granda krea farno, en kiun estas enmetitaj ĉiuj virtoj kaj la tuta homa eksterordinareco de la personeco.

El bulgara: V. Borovanski



BONEGA ARMILO

Senbrue, obstine, metode, en daŭro de kelkaj jardekoj niaj bulgaraj e-istoj kompetente kaj kun gusto tradukis kaj tradukas plu la plej belajn verkojn de la bulgara belarta literaturo kaj konigis ilin al proksimaj kaj malproksimaj popoloj. Per E-o, kiu kapablas interpreti kaj la ĝustan sencon, kaj la patoson de la versa lingvaĵo, malproksimaj popoloj el la kvin kontinentoj, el insuloj kaj el nekonataj landoj ekkonis kaj ekkonas la inspiroplenajn versaĵojn de Botev, Vazov, Javorov, Slavejkov, Poljanov, Smirnenski, Geo Milev, Vapcarov, la versaĵojn de niaj nuntempaj poetoj.

Se la plej vasta intereso de literaturo kaj kulturo helpas por la reciproka konigo de ĉiuj nacioj kaj se tiu reciproka interkonigo hodiaŭ prezentas gravan kaj akran armilon en la batalo por gardi kaj stabiligi la paco, ja niaj e-istoj jam delonge utiligas lerte tiun ĉi bonegan, althumanan armilon.

Ili ne ellasu el siaj manoj tiun ĉi armilon. Ili tenu ĝin ankoraŭ pli forte, ili instruu per ĝi la junajn talentojn en tiu regiono — la rezultoj estos ankoraŭ pli fruktodonaj, ja ili ne povus ne esti pli fruktodonaj.

Mi kredas, ke en siaj noblaj patriotaj pensoj niaj e-istoj trovas la plej vastan subtenon de ĉiuj, kiuj batalas por paco, bona vivo kaj demokratio.

(El paĝo 9)

— Bone, infano mia, mi ĉion klarigos, — li diris. — Sed antaŭ ĉio trankviligu!

Mi forviŝis la larmojn. Avo Stojan daŭrigis:

— Ekde infaneco mi vagas tra arbaroj kaj kamparo. Multon vidis miaj okuloj, ĉar mi estas ŝafisto. Ankaŭ tion, kio okazis nun, mi observis kelkfoje. La cikonioj geedziĝas nur unu fojon en sia vivo. Se edzo aŭ edzino perfidas, ilia tuta rondo kolektiĝas kaj kondamnas ilin al morto. Se tio okazas proksime al la tempo, kiam ili devas forflugi suden, ili ne permesas al la kulpuloj kunflugi...

La maljuna ŝafisto longe rakontis pri la vivo kaj leĝoj de la cikonioj. Finfine li diris al mi:

— Mi vidis vin kaŝi sin malantaŭ kratago kaj intence lasis vin vidi tion, kion malmultaj homoj vidis. Nun vi scias, ke la cikonioj geedziĝas nur unufoje kaj restas fidelaj unu al alia ĝis la fino de sia vivo. Memoru tiun ĉi okazon! Revenu al la granda urbo kaj rakontu al la homoj pri ĉio, al kio vi estis atestanto!

La maljunulo foriris al sia ŝafaro. Mi ankoraŭ staris kun la morta birdo enmane. De la proksima arbaro alflugis kantoj de najtingaloj. Kelkaj cikonioj promenadis sur la herbejo. Nur ili memorigis al mi pri la granda cikonia koliero kaj pri la severaj cikoniaj leĝoj.

PIERRE DE COUBERTAIN KAJ LA PACO

Nun ĉiuj pacamaj homoj en la mondo atendas la daton de la Olimpiado 1980 en Moskvo. Ili kun danko direktas ankoraŭfoje siajn pensojn al la memoro de tiu modesta kaj obstina homo, kiu batalis kaj sukcesis renovigi la olimpiajn ludojn. Pierre de Coubertain (Pier de Kuberten) naskiĝis en 1863 j. en Parizo. Aristokrato laŭdevene, li portis ideojn de reformanto kaj demokrato. Liaj biografioj skribas, ekzemple, ke li



prizorgis la efektivigon de senpagaj laboristaj fakultatoj en Francio, kaj tio alportis al li la nomon de „fantaziulo“ kaj „revoluciulo“. Sed Pierre de Coubertain montrigis homo kun realisma kaj sobra penso, amiko de la paco kaj progreso. Rezulto de lia aktiveco estas la renaskiĝo de la olimpiadoj. En 1912 j. li partoprenis literaturan konkurson dum la Stokholma Olimpiado kaj gajnis oran medalon. La titolo de lia verko estas „Odo al la sporto“ (Ode au sport). En la IX parto de la odo li skribas:

„Ho, sporto, vi estas paco. Vi efektivigas bonajn rilatojn inter la popoloj, alproksimigante ilin al la kulto de kontrolebla, organizita, sendependa forto. Dank' al vi la tutmonda junularo edukigas esti mi reciproke, kaj tiamaniere la varieco de la naciaj kvalitoj estigas fonto de nobla kaj paca konkurado.“

La malamikoj de la Moskva Olimpiado, la proponintoj de ĝia translokigo kaj bojkoto pro politikaj celoj nepre devas memori la noblan intencan de Coubertain — kunligi la sporton kun la interpopola kompreniĝo, sed ne kun la efemeraj celoj de la kuranta politiko.

Hristo MANOLOV

VERKEMAJ SAMIDEANOJ, PARTOPRENU LA LITERATURAN KONKURSON DE «BE» LA LIMDATO PROKSIMIĜAS! (VIDU LA KONDIĈOJN EN N-R0 2).

DIGNA FILO DE NIA POPOLO

Naskita la 24-an de januaro 1905 en la montara vilaĝeto Radotina, Trifon Ĥristovski jam en la vintroj estas trafita de insida malsano (paralizo). Liaj avo kaj patrino portas lin surdorse al lernejo, por lerni almenaŭ la alfabeton, sed baldaŭ ili vidas, ke tio estas senutila. Sed la soifo al scioj ĉe la malleŭa infano estas neordinare forta. Kaj laŭ la vojo de memklorigo tiu ĉi kripla vilaĝana filo fariĝas vigla sociaganto kaj batalanto. Sub la influo de partiaj kaj jun-komunistaj agantoj li fervore legas marksisman-leninisman literaturon kaj lia granda menso estas konkerita de la komunismaj ideoj. Tio ankoraŭ pli forte bruligas ĉe li la soifon al scioj kaj kulturo, la ŝtalan volon batali, vivi senocplene kaj digne.

Enirinte la vicajn de la Komunista Partio, Trifon fariĝas aktiva organizanto de la antifasisma movado. Li organizas publikajn kunvenojn, partoprenas kiel delegito subdistrikajn nelegajn konferencojn, fariĝas la animo de ĉiuj manifestigoj de la politika, ekonomia kaj kultura vivo en sia naskiĝvilaĝo. Sur liaj malfortaj ŝultroj kuŝas grava respondec: unu el la fondintoj de la partia organizaĵo en Radotina, li tutajn 17 jarojn — ĝis sia lasta spiro — estas ĝia neŝangita sekretario.

Dotita per brila krea talento, Ĥristovski estis unu el la plej temperamentaj agantoj de la bulgara ĵurnalistiko dum la 30aj jaroj. Sur la pagoj de nia revolucia proletgazetaro kaj en iuj eksterlandaj periodaĵoj — „Novini“ (Novajoj), „Nakovalnja“ (Amboso), „Rabotniĉesko Delo“ (Laborista Afero), „Zarja“ (Cielruĝo), „Eho“, „Vedrina“ (Serenio), „Mejdunaroden Rabsekor“ (Internacia Laborista-Kampana Korespondanto), „Cas“ (Horo), la kanada „Unueco“, la organo de Internacio de Proletaj E-istoj (IPE) „Internacisto“ — aperas multnombraj artikoloj, raportoj, politikaj kaj kulturaj notoj, subskribitaj per lia nomo aŭ per unu el liaj pseudonimoj Brestov, la vilaĝano H. Orhanie, Narodofrontovec (Ano de la Popola Fronto) kaj.

Al la publicista plumo de Ĥristovski apartenas la aperintaj antaŭ la Dua Mondmilito broŝuro „La morto de Ĥristo Botev“ kaj la

libro „Problemoj de la vilaĝo“, kiuj elokvente parolas pri liaj civitana konscienco kaj analiz-



kapablo penetri la esencon de la traktataj demandoj. Li estas aŭtoro ankaŭ de du aliaj libroj — „La milito en la Malproksima Oriento“ kaj „Amo kaj edzeco“, kies apero en presita formo la faŝista cenzuro malpermesas. Ĉiam memorata restos en la historio de la bulgara revolucia ĵurnalistiko lia arda defendo al la eksterleĝa Komunista Partio kaj ĝia Septembra Ribelo en 1923 j. polemike kun la ĉefredaktoro de j. „Svjat“ (Mondo) — la usona agento en Bulgario Markom.

Trifon Ĥristovski lasis al la generacioj eminentan verkon — sian arta-dokumentan autobiografion „Mia vivo“. En ĝi kiel en speculo vidigas la vilaĝana vivo en la kondiĉoj de la monarkofaŝisma diktaturo ĉe ni. Ĉiu, kiu legas la emocian rakonton pri la kruela sorto de la brava Trifon Ĥristovski, ne povas ne ekvrii: „Jen nia, la bulgara Nikolaj Ostrovskij!“

Ellerninte la internacian lingvon E-o, la komunisto de Radotina Trifon Ĥristovski konigas al la eksterlanda demokratia gazetaro la vivon kaj la eventojn en Bul-

gario, kaj al nia leganto — per sia riĉega korespondado kun e-istoj el la tuta mondo — gravajn eventojn el ĉiuj landoj kaj kontinentoj: aparte valoraj estas liaj korespondadoj kun sovetaj e-istoj, trovintaj lokon en j. „Pogled“ (Rigardo) kaj en la laboristaj E-periodaĵoj.

Trifon Ĥristovski — tiu ĉi fortika kaj eltenema ido de la malnova hajduta Balkano — subtenas plej aktivan korespondadon kun elstaraj agantoj de nia progresema kultura kaj literatura fronto — Georgi Bakalov, Sava Ganovski, Jak Natan, Atanas Smirnov, Boris Milev — Ogina ka. Grandan intereson prezentas lia korespondado kun Vasil Vodenickarski. En postkarto, ricevita de la aŭtoro de ĉi tiuj linioj en 1941 j. — monaton post la invado de la germanaj trupoj en nian landon — li skribas: „Jam malfacile oni spiras. Nun mi povas ironic diri, ke mi estas pli feliĉa ol la sanuloj. Sed mi dolore travivas la teroron super mia popolo — tiel intime mi estas ligita kun ĝi“. Kaj plue: „Mi abonigis kelkajn konatojn al „La suda stelo“. Sed la eventoj ĉesigos la aperadon de tiu bona gazeto. Mia jugoslava korespondanto ĉesos skribi. Eble por ĉiam — kiel Lezan. Kruela epoko! Ĉiuj popoloj suferas. Pro la interesoj de la kapitalistoj. Ĉu estos respondeco? Via: T. Ĥ.“

Trifon Ĥristovski estis dotita per granda koro, inspirata de neelĉerpebla optimismo, de firma kredo je la justeco de la proletara afero kaj ĝia neevitebla venko, de nerompebla volo al batalo. „Mi vivis la vivon de ordinara soldato en la batalo por pli bona vivo de la laboramasoj, kiuj estas mia natura medio...“ — skribas li.

Trifon Ĥristovski estis granda revolucio-internacisto, tial ankaŭ granda patrioto. Tiu ĉi digna filo de nia popolo estingigis en la maltrankvila printempo de 1944 j., nur malmultajn tagojn antaŭ la mateno de la venkoporta naŭseptembra tago. Sed liaj nomoj kaj afero ne povas esti forgesitaj. Ili restos eterne vivaj en la popola memoro.

Nano KJUĈUKOV

AL NIKOLA ALEKSIEV

Via letero emociis min ĝis la fundo de la animo. Nun, kvankam tiel malbone fartanta, mi komencis verki la autobiografion kaj mi skribas fulmrapide, ĉar mi timas, ke ne sufiĉos al mi la fortoj por ĝin finverki. Ĝis nun dum tri tagoj mi verkis 40 paĝojn. Ne tiom koncize, sed detale...

Kun ĝemoj kaj lamentoj mi skribas. Mi suferas teruran tuson, kiu ne forpasas. Ĉe la tusado kvazaŭ disirigas pulmoj kaj internaĵoj. Doloroj en la brusto. En malbona stato estas ambaŭ kruroj. Unu estas ŝvelinta, grandega, rigida. La alia multe doloras. Akre doloras ankaŭ la lumbo. La tuberkulozo de la ripoj ankaŭ manifestiĝas. Mi apenaŭ moviĝetas sur la lito.

februaro 1944

Mi verkis la autobiografion fulmrapide kaj bone mi faris. Se mi estus prokrastanta, mi ne sukcesus ĝin finverki. Jam multajn tagojn mi kuŝas dorse, ne povante ekstar pro doloroj en la piedoj. Kuŝante mi mangas... skribas. La lumbo komencas fistuli, kaj mi havas terurajn dolorojn... Mi preparas min por la morto...

2 majo 1944

CELEBRO DE PATRONO

La 24an de januaro la E-societo en Pomorie celebris solene la 75an datrevenon de la naskiĝo de sia patrono Trifon Ĥristovski. La kunvenon ĉeestis multaj membroj de la societo, ankaŭ gastoj e-istoj el la distrikta urbo Burgas.

Raporton faris k-dino Irina Dimitrova, Bazigante sur la autobiografia libro „Mia vivo“ de Ĥristovski ŝi konatigis la aŭskultantojn kun lia neordinara vivo kaj agado. En multaj rilatoj Ĥristovski similas al sia samtempulo, la mondkonata sovetia verkisto Nikolaj Ostrovskij. Kiel li Ĥristovski obstine toleris la fizikajn suferojn kaj malgraŭ tio dediĉis sian vivon al la granda idealo pri liberigo de la laboruloj. En lia peza sorto grandan kuraĝigon kaj ĝojon donis al li E-o kaj lia korespondado kun e-istoj el multaj landoj.

Post la prelego sekvis mallonga literatura programo. Recitis versojn en E-o T. Vardalieva, V. Serbezov, A. Kanakieva kaj N. Nikolova. S. Janeva legis fragmenton el la parolado de Zamenhof en Londono. Estis plenumitaj E-kantoj. Fine k-d Serafim Serafimov el Burgas surprizis nin traŭgante sian versajon „Renkontiĝo“, dediĉitan al Trifon Ĥristovski.

Alis Konstantinova

EKSPOZICIO DE AFIŜOJ

La tjumena E-klubo „Revo“ organizos ekspozicion de afiŝoj je la temo „Homo kaj naturo“ kun la celo plifortigi la defendon de la naturo fare de la homo. Ni petas, sendu al ni konvenajn materialojn el via lando. Ĉiu sendinto estos rekompencita per olimpikaj aŭ politikaj afiŝoj aŭ laŭdeziere.

Adreso: 625001 Tjumen 9, ab. k. 139 Esperanto-klubo „Revo“, Sovetunio.

Por kompletigi E-bibliografion mi petas informojn pri tradukoj el la pola poezio, aperintaj en E-periodaĵoj. Bonvolu skribi al: PL 24-220 Nledzwica Duza, Zbigniew Czupkalo, Pollando.

EL LA KORESPONDADO DE ĤRISTOVSKI

Kun Ate van Kampen ni korespondis de 1931 ĝis 1935 jaro. Li estis de Amsterdamo (Nederlando), 30-jara, edzo kun unu infano, oficisto ĉe la borso kaj ricevis monatan salajron de 240 ned. guldenoj. Per tia salajro mia korespondanto povis bone vivi. Sed anstataŭ tio li estis dediĉinta sian tutan libertempon (en la borso li laboris po 9,30 h.) al socia agado kaj batalo kontraŭ la socia kaj ekonomia subpremo en sia lando, estis en la progresemaj sociedoj, fordonis sin al riskoj. Kaj se iu demandus, kial li partoprenas la vicojn de la malsataj kaj malkontentaj, kiam lia salajro estas tiel bona, van Kampen respondus: „Ĉar tamen mi estas dunglaboranto intelekta, kaj en la hodiaŭa mondo de ekonomiaj krizoj kaj katastrofoj nenio estas certa — morgaŭ ankaŭ mi povus esti sur la strato.“

La postaj eventoj plene pravigis liajn vortojn. Kiam Anglujo forlasis la oran monbazon, la landoj, ligitaj kun ĝia valuto, inter kiuj ankaŭ Nederlando, suferis financajn skuojn. Tiam la salajro de van Kampen en momento malgrandiĝis per 50%. Kaj post kelkaj monatoj li komencis skribi al mi alarmplenajn leterojn — ke eble baldaŭ li restos senlabora. Ĉu vere tiel okazis mi ne povis ekscii, ĉar ĝuste tiam li ĉesis skribi kaj nenion plu mi povis ekscii pri li.

Kun la franco Jan Lezan konatigis min en 1944 j. mia sveda amiko Jonson, kiu sciis, pri kia korespondanto mi havas bezonon. Li konis nin ambaŭ. Jan Lezan estis instruisto en malgranda vilaĝo en Pireneoj, ĉe la hispana ŝtatlimo, en la regiono de urbo Kastelno Manuak. Antaŭe li laboris kiel instruisto en franca Maroko...

La vivo de Lezan estis vivo de obstina batalado kaj vasta sociagado. Li estis membro de multaj francaj progresemaj organizaĵoj, ricevis ties organojn kaj kunlaboris al ili, kunlaboris ankaŭ al la instruista E-revuo...

Kiam eksplodis la Civitana Milito en Hispanio (1936), la vivo de Lezan komplikigis pro nova laboro. En la ferioj de 1936 j. li kun sia amiko trapasis la limon „kompreneble ne kun malplenaj manoj“. Li skribis al mi pri la vilaĝanoj de Aragona, armitaj per ĉasfusiloj. „Sed kion povas fari ilia entuziasmo kontraŭ la 250-kilogramaj bomboj!“ Revenante el Hispanio Lezan fordonis ĉiujn fortojn al la hispana popolo — kolektadis helpmonon, akceptis kaj logigis fuĝintojn.

Kiam la Kataluna Armeo estis disbatita, la Pireneoj mezvintre estis invaditaj de fuĝintoj. Centoj mortis en la lavangoj. Lezan renkontadis la malfeliĉulojn. „Aŭdinte de mi hispanan parolon — skribis li, — ili venas kaj dekoj ĉirkaŭas min, parolas al mi, el iliaj okuloj gutas larmoj, el mia koro — sango...“

ABONIGI nur sin, tio ne estas sufiĉa por la vera esperantisto. Li devas esplori, ĉu liaj konatoj abonis nian asocian organon, kaj abonigi ĉiun, kiu preterlasis fari tion. Do, varbu ankoraŭ abonantojn! Agu energie kaj senprokraste! La estraroj plenumu la donitajn planojn!

Ni iru digne al nia 40a jubileo!

NI NEPRE ATINGU 6100!

LA FONDINTO DE UEA

En 1903 la svisoj Hector Hodler (Hector Hodler, 16-jara) kaj Edmond Priva (Edmond Privat, 14-jara) eklernis E-on kaj baldaŭ fondis gazeton por lernantoj „Juna Esperantisto” — la unuan de tiu speco. Sur lerneja benko ili verkis artikolojn kaj redaktis la gazeton; la prezo kaj bindejo troviĝis en la tegmentejo de la domo de Edmond.



En 1906 ili brile organizis la 2an Universalan Kongreson de E-o en Genevo kaj la sekvan jaron la du amikoj finis gimnazion. Sed Hodler, laŭ Priva, „la pli multscia el ni du”, ne volis studi en universitato, ĉar li konsideris ĝin „tro malnovmoda kaj tempoperda”. Hector Hodler decidis tute dediĉi sin al E-o, kion ebligis la financa bonstato de lia patro — la elstara pentristo Ferdinand Hodler.

Hodler transprenis la eldonadon de gazeto „Esperanto” en 1906 kaj ekde 1907 energie komencis plendi por praktika utiligo de la lingvo, aperigante liston de konsuloj kaj E-oficejoj, transformigantaj poste en la delegitan reton de UEA. Dum tiuj jaroj oni ofte diskutis pri fonda de internacia E-organizaĵo. La Centra Oficejo en Parizo, starigita de generalo Sebert en 1905, estis teknika sekretariejo por la t. n. Oficialaj Institucioj de Esperanto — la Lingva Komitato kaj la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kiu neniel povis kompensi la mankon de internacia organizaĵo.

Fine de 1907 la E-movado estis grave minacita de la projekto de „plibonigita E-o”, nomata Ido. Tiam aparte akriĝis la neceso pri internacia E-asocio. Hodler komprenis, ke neniu gvidanto rajtas trudi teoriaĵojn al la uzantoj de la lingvo, kaj oni urĝe devis ekagi por praktika uzo de E-o. Por ne malhelpi la ekzistantajn en Parizo centrajn instituciojn kaj por ne kaŭzi novajn organizajn diskutojn, Hodler limigis sian ambicion al pli malvasta asocio, sed tute demokrata kaj servopreta. Konforme al tio en februaro 1908 li kaj kelkaj liaj kunlaborantoj dissendis cirkuleron pri fonda de Universala E-Asocio, kiu celos: „1) puŝi nian aferon en la vojon de

(Sur paĝo 15)



NOVJORKA OFICEJO DE UEA ESTABLITA

Nia laborskalo ĉirkaŭ la Unuiginta Naciaro en Novjorko estas nun serioze pligrandigita por adapti al la bezonoj de la nova epoko.

En novembro 1979 establiĝis la Novjorka Oficejo de UEA kaj ekde tiam duontage salajrata direktoro, s-ino Gaki Makalun (Jackie MacAloon).

La oficejo situas rekte antaŭ la Domo de UN, oportune por sia funkciado. La adreso: Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

La oficiala malfermo okazis je la 13 de decembro 1979, por kio estis invitataj reprezentantoj de Neregistaraj Organizaĵoj kaj la UN-oficejo. Krome la nova oficejo akceptis du tagojn poste ankaŭ anojn de la 3 kursoj okazantaj en Novjorko. Dum tiuj akceptoj estis utiligata la fotoekspozicio pri la infana jaro, kiun la kongresanoj vidis en Lucerno.

Por superrigardi la funkciadon de la Novjorka Oficejo fondiĝis Stir-Komitato el pli ol 20 personoj, inter kiuj ankaŭ prof. d-ro H. Tonkin, la prezidanto de UEA.

Fondita estas ankaŭ la sistemo de „Amikaro de la UN-placa Oficejo” — organizo, kiu estas malferma al ĉiuj simpatiantoj kaj subtenantoj de E-o, sendepende de tio, ĉu ili scias la lingvon aŭ ne. Por ordinara membreco oni pagas minimume 10 dolarojn jare.

AGADO EN 1979

Antaŭ ol la oficejo en Novjorko establiĝis, la laborgrupo tiefaris signifajn laborojn sub la prezido de d-ro Tonkin, krom atingi, ke la sekretario de EKO-SOK de UN venu al la Universala Kongreso de E-o en Lucerno.

En januaro 1979 UEA aliĝis al la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en konsulta stato kun la Ekonomia Kaj Socia Konsilio de UN (mallonge: Konferenco de UN-NROJ). Tiun konferencon organizas NROJ mem.

La laborgrupo ekspedis la raporton pri la UK de E-o, okazinta en Rejkjaviko en 1977, al ĉiuj registaraj delegitaroj de la Unuiginta Naciaro. La ĉeftemo de tiu kongreso estis, kiel oni memoras, „la rajto de komunikado”. La koston por la ekspedo pagis donace la antaŭa ambasadoro de Aŭstralio ĉe UN, s-ro R. Heri (Harry), nia „monda diplomato”.

TONKIN DENOVE PRELEGIS EN UN-DOMO

Laŭ invito de la lingvistika klubo de UN, en oktobro 79 la prezidanto de UEA s-ro H. Tonkin (profesoro en la Universitato de Pensilvanio), prelegis en la Domo de UN pri E-o kaj pri argumentoj por E-o. Tio estis la duafoja prelego por li (la unua okazis en aprilo 1978).

Ĉeestis la arangan ankaŭ s-ro R. Muller, sekretario de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN, kiu dum la UK en Rejkjaviko (1979) diris: „UN bezonas vin. La mondo bezonas vin.”

Post la unuhora prelego sekvis duhora demandado de ĉeestantoj (ĉ. kvardeko da homoj). Intervenis i. a. s-ro Muller, parolante pri siaj bonaj spertoj, kiujn li havis dum la UK. Ĉar la membroj de la lingvistika klubo de UN estas grandparte oficistoj por lingvaj servoj, iliaj interesiĝoj pri E-o estis grandaj. Kvin el ili esprimis deziron lerni E-on.

praktika aplikado per kreado de diversaj internaciaj servoj per E-o kaj 2) krei fortikan ligilon de solidareco inter diverslandaj samideanoj kaj doni al nia afero praktikan fundamenton.

Kiel rezulto de la junula ribelo kontraŭ la rivalantaj inter si gvidantoj la 28an de aprilo 1908 fondiĝis UEA. Ĝi konsistis nur el individuaj membroj de ĉiuj landoj. En ĉiuj pli gravaj lokoj UEA havis delegitojn, kiuj donis informojn kaj helpon al membroj, dezirantaj tion. En ĉiu lando estis ankaŭ ĉefdelegito, kiu prizorgis la administradon kaj reprezentis la estraron de la Asocio. UEA eldonis ĉiunmonatan gazeton „*Esperanto*“ kaj ĉiujare jarlibron kun la adresoj de siaj delegitoj. Ĝi okazigis ĉiujare sian kongreson (la unuan fojon memstare en 1910 en Augsburg, Germanio). UEA diferencigis inter e-isto laŭ la Bultona Deklaracio kaj membro de UEA, kiu en E-o vidis modelon de estonta homaro, internacie solidara kaj kunlaborema.

Hektor Hodler batalis por demokratiigo interne de la Movado. Li rifuzis taksu la mondlingvan problemon sendepende de la sociaj problemoj, ĉar „ni ne devas ĝin izoli for de la ekstera mondo“. Jam kiel knabino estis komprenema pri la laboristaj bezonoj kaj klasa malegaleco. Foje li kondukis sian amikon Priva al unu el la pontoj de Genevo por rigardi la batalon inter armeo kaj strikantoj.

Por Hodler esperantismo signifis „precipe socia, konstrua kaj progresema movado“. La praktika internaciismo de UEA alportus pli konkretajn rezultojn „ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, sed neniam faris ian seriozan klopodon por ĉe parte efektiviĝi siajn ideojn en la reala vivo“.

Rezultoj de internacia solidareco estis la lanĉita de Hodler en Svislando dum la Unua Mondmilito servo por transsendo de familiaj korespondadoj inter malamikaj landoj. Leteroj devis atingi malmulte UEA-oficejojn en Genevo, kiu transsendis ilin al la dezirata lando kun eventuala traduko en ties lingvon, se necese. Ĉiutage 200-300 leteroj alvenis kaj resendigis. Tiamaniere E-o kaj ĝia organizaĵo povis iom helpi en la homaj suferoj. La faritaj servoj atingis 200 000. Jam dum la milito Hodler imagis la postmilitan socion, kiu reorganizu la vivon en repaciĝanta mondo. Li antaŭvidis kreskon de la kolektivismaj tendencoj, pliakraĵon de la klasbatalo kaj novan rolon de E-o en la formigo de estonta internacia ordo. Hodler profete atentigis, ke E-o ne povas havi ŝancojn de ĝenerala akceptigo sen estiĝo de forta internaciismo.

UEA restis sola reprezentanto de la tutmonda E-movado kaj iom post iom okupis la lokon de la Centra Oficejo. Malfeliĉe la 31an de marto 1920 tuberkulozo kaŭzis la morton de Hektor Hodler — tiu antaŭvidema gvidanto. Prave skribis Edmon Priva pri sia amiko: „Al tio, kion iniciatis la genio de Zamenhof sur la kampo lingva li (H. H.) aldonis la necesan bazon sur la kampo socia.“

Evgeni Georgiev

«LAZURA TAGO — 4»

Dum la novjara vespero en u. Tjumen, USSR, por la kvara fojo okazis tradicia E-renkontiĝo, kiun partoprenis pli ol 50 e-istoj el 11 urboj.

Dum la renkontiĝo okazis interŝanĝo de organiza sperto en la E-laboro kaj ekskurso tra la festa urbo. Vespere en speciale ornamita salono estis aranĝita novjara amuzado, kiu daŭris la tutan nokton. Estis belarta programo, dancoj, E-loterio. Avo Frosto kaj Negino gratulis la ĉeestantojn en la lingvo de la internacia amikeco.

A. Korjenkov

Verkojn kaj nigrablankajn gravuraĵojn de 12-16-jaraj lernantoj kolektas E-klubo „Amikeco“ en Rostov/Don por organizi ekspozicio(j)n kaj serio(j)n da artikoloj en junularaj ĵurnaloj, lernejoj ktp.

TEMJOJ:

I. Omaĝe al la 110-jara datreveno de Leninnaskiĝo (22. IV. 80):

1. Lenin vivas ĉiam.
2. Nia lando marŝas laŭ la vojo de Lenin.
3. Nia forto — la amikeco (pri amikeco kun USSR).
4. Sovetunio — la lando de Lenin.
5. Vizito de Lenin al nia lando (aŭ urbo).

II. Omaĝe al la tago de pioniroj (19. V. 80):

1. Nia pionira taĉmento.
2. Pioniroj-herooj.
3. Sovetaj pioniroj — niaj amikoj.
4. Al kiu pioniro mi volus simili.
5. Miaj rememoroj pri Artek.

III. Omaĝe al la internacia tago de infanoj (1. VI. 80):

1. Kiel kaj kiaj mi edukos miajn infanojn.
2. La plej interesa okazintaĵo en mia vivo.
3. Pri kio mi okupiĝas en mia libera tempo.
4. Pri kio en mia Patrio mi pleje fieras.
5. Mia plej ŝatata libro kaj ĝiaj herooj.
6. Kiel pasis la Jaro de l'Infano en mia lando (aŭ urbo).

NOTOJ:

1. La verkoj estu en E-o aŭ en rusa lingvo (eblas, ke ni ricevu tradukon fare de instruisto).
2. Bonvenas ankaŭ aliaj (krom la menciitaj) temoj samspiritaĵ.
3. Verkoj pri temoj daŭre aktualaj estas bonvenaj ankaŭ post la indikitaj datoj.
4. La plej aktivaj partoprenantoj ricevos premiojn.

Ĉion sendu al adreso: Melnikov A. S., SU-344007 Rostov-Don — 7, p. k. 393 USSR.

CELEBRO DE N. ALEKSIEV EN RUMANIO

Dimanĉe, la 20-an de januaro 1980, la kolektivo Esperanto-Interlingvistiko (KEI) ĉe la Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj de Rumanio organizis en la Universitato de Timișoara festan kunvenon dediĉe al la elstara aganto de la bulgara kaj internacia E-movadoj Nikola Aleksiev — granda filo de la bulgara popolo, batalanto por paco kaj socialismo. Ĉeestis membroj kaj kunlaborantoj de KEI el diversaj lokoj de regiono Banat, la membroj de la du sciencaj rondoj de la universitata centro Timișoara — „*Esperanto en la scienco*“ kaj „*Esperantologio*“, universitatanoj, intelektuloj el la urbo kaj multaj gestudentoj. En sia ĉ. 50-minuta festparolado prof. d-ro Ignat Bociort, prezidanto de KEI, prezentis per tre varmaj vortoj la diversflankan kaj fruktdonan aktivecon de la estimata kaj amata granda humanisto Nikola Aleksiev.

Poste prof. d-ro Bociort kaj prof. d-ro Cezar Apreotesi, vicprezidanto de KEI, rakontis travivaĵojn el la UK en Varno, kie ili konatigis persone kun k-do Aleksiev. Gestudentoj de la Universitato legis poeziaĵojn el la bulgara literaturo (aprigitajn en „*Bulgara Esperantisto*“), artikolojn pri la rumana-bulgara historia amikeco kaj frateco en la batalo por liberigo de ambaŭ patrioj el otomana kaj faŝisma jugoj kaj en la konstruo de socialismo, rumajn literaturajn tradukitaĵojn de bulgaraj e-istoj, ka.

Mioara Dobrescu
org. sekretario de KEI

Verdaj steloj

102 jariĝo de nia libero

Ljudmila Paspaleeva

LA PRAPRAAVA PELERINO

El la granda blanka pelerino, kiu multe da jaroj kuŝis en la kesto, la patrino decidis tajli novan, por Mila.

— Nun mi ŝparas por apartamento, — diris ŝi. — Ni ne aĉetos novan palton.

Kaj prenante sian filineton, aldonis gaje: — En tia blanka pelerino vi estos kiel Neĝulino — la helpantino de Avo Frosto. La pelerino ankaŭ bone varmigis vin.

La granda blanka pelerino havis frangojn, similajn al pendadoj de prujno. Mila tuj vidis sin helpanta al la bona Avo Frosto kaj demandis:

— Ĉu estos kapuĉo?

— Estos! — respondis la patrino.

Mila sidis kaj rigardis, kiel ŝia patrino desegnas sur la ŝtofon kaj atente evitas la grandan malhelan makulon ĉe la malsupra rando de la pelerino.

Guste tiam revenis avino Anka el la provinco. Vidinte la sternitan surtable pelerinon, ŝi subite maltrankviliĝis.

— Kion vi faras? — diris ŝi.

Sed kun tia riproĉo en la rigardo kaj en la voĉo, ke la patrino de Mila lasis la tondilon, per kiu ŝi jam intencis ekagi.

— Vi atendis min forvojaĝi kaj tuj komencis misagi, — ne ĉesis avino Anka.

Nia reĉo

SERCE DIRITE, CELE PENSITE

Antaŭ nelonge aperis la dua volumo de „Instrua amuzo“, enhavanta 20 krucenigmajn kun kaŝfrazoj kaj 21 etajn krucenigmajn. Ties aŭtoro Stano Markoĉek tre sukcese plenumis sian promeson, donitan en la enkonduka teksto de tiu 56-paĝa belaspekta libreto: amuzigi kaj instrui la hobiulojn. Ili estas instruataj ne nur pere de la solvado de la krucenigmaj mem, sed ankaŭ per la kaŝitaj en ili frazoj kaj proverboj.

Por amuzo multon donas ankaŭ la humuraĵoj, elpensitaj kaj desegnitaj de Stano Markoĉek, entute 22, inter kiuj aparte menciindas „Virin-telefonado“, „Urs-ĉasado“, „Fin-line ĉesis plui“ k.a.

„Kiu el ni ŝatas la humuron? Kaj kiu el ni ankoraŭ ne provis solvi — almenaŭ nacilingve — krucenigmon?“ — skribis la aŭtoroj en la unua volumo. Kaj plue: „Sed se la verko plaĉas al vi, skribu tion...“

Jes, la verko ege plaĉas al ni kaj jen ni skribas, atendante kun granda intereso la aperon de la sekva volumo.

Hobiulo: Mar

Mila provis trankviligi ŝin: — Ne koleru, avino! En la pelerino mi estos vera Neĝulino.

Sed la avino ne trankviligis:

— La pelerino restis de via prapraavo. Memorajo, ke li estis rusa oficiro kaj batalis por nia libero.

Mila konjektis:

— La instruistino rakontis al ni, ke la rusoj liberigis nin el la kvinjarcenta jugo.

— Via prapraavo estis inter tiuj ĉi bravuloj. Li prenis unu bulgaran orleton kaj faris lin sia infano. Tiu ĉi knabo estis via prapraavo. Kiam li finis siajn studojn, li revenis Bulgarijon. Jen pro kio mi tiel gardis ĉi tiun pelerinon.

La filino ĉesigis ŝin:

— Vidu, kia makulo! Eĉ estas truoj! — Kaj ŝi volis montri la truon.

— La makulo estas pro la vundo... — kontraŭdiris avino Anka. — Apud Pleven li estis vundita ĉe la kruro. Jen kie trapasis la kuglo. Verŝajne li tre, tre suferis...

La patrino ne tajlis la pelerinon de Neĝulino. Mila plue restis en la malnova pasintjara, iom mallonga palto.

Sed kiam la instruistino kondukis la infanojn al la muzeo, la blanka pelerino estis jam tie. Avino Anka estis donacinta ĝin. Sia bofilo diris, ke tie estas ĝia loko.

— Venu! Venu! — kunvenigis Mila siajn kamaradetojn antaŭ la pelerino. — Vidu kiel batalis por la libero mia prapraavo. Tio ĉi estas de lia sango! — kaj ŝi fiere montris la grandan, malhelan makulon, traboritan de kuglo.

GRANDA PERDO, POR LA E-POEZIO.

Fine de januaro en Riga (USSR) tute subite forpasis la konata E-poetino kaj aktiva kunlaborantino de „Bulgara Esperantisto“

LJUDMILA JEVSEJEVA

Naskita en 1913, ŝi finis gimnazion en Riga, poste konservatorion kaj la filozofian fakultaton de la Universitato.

Sia instruisto de E-o estis Genadij Tupicin, kiu inspiris al ŝia lernantino tian fortan amon al E-o, ke ekde ŝia 16-jara aĝo ŝi plene dediĉis sin al ĝi. Kiel E-poetino, precipe infana, Jevsejeva estas vaste konata tra la tuta mondo, ĉar ŝiaj verkoj aperis en multaj E-jurnaloj kaj revuoj.

La hela memoro pri Ljudmila Jevsejeva restos ĉe ni por ĉiam!

LA REDAKCIO DE „BE“

ARBARA KURACISTO


Se en arbaro malsanas frakseno,
pino aŭ kverko. Jam tuj, de mateno,
venas helpanto en ruĝa ĉapeto.
Ŝelon de l'arbo esploras beketo.
Tute senpaga kuraco kaj flego.
Dankon al kiu adresi?

joŝad IV

ZOO-STUDO

Supre kaj malsupre — plado,
tute ronda, kiel rado,
tra arbaro ĝi moviĝas,
korp' piedoj videbliĝas.
Tute simpla zoo-studo.
Temas, knaboj, pri . . .
"opnjŝaj"

ARKOKRUCENIGMO



(Kaŝitaj estas kvar nomoj de manĝeblaj naturproduktoj)

Dekstren al la centro: 1. Virnomo (de multaj reĝoj). 2. Granda ronda ligna vazo. 3. Metala vesto de aŭtomobilo. 4. Dolĉa tropika frukto. 5. Apudmara. 6. Publika diskutejo. 7. Inklino al timo. 8. Ŝlosaparato. 9. Specialisto. 10. Estonto. 11. Ceno por malliberuloj. 12. Komerco, entreprenado por monprofito. 13. Granda dancamuzo. 14. Malgranda surbicikla aŭ surĉevala seĝo. 15. Rajto je laŭdo aŭ rekompenco. 16. Disketforma fermilo (kun tenilo) de vestoj.

Maldekstren al la centro: 1. Kvalito, faranta ion admirinda, plaĉa. 2. Rapidege paŝi. 3. Batita persono. 4. LA UNUA KASITA VORTO. 5. Nobela titolo. 6. Kapkovrilo. 7. Desinfektilo. 8. LA DUA KASITA VORTO. 9. Longnaza heroo en dramo de E. Rostand (fonetike). 10. Parto de la kruro. 11. Aĝema, laborema. 12. LA TRIA KASITA VORTO. 13. Vivejo de la animaloj. 14. Blankŝela foliarbo. 15. Parteto de sago. 16. LA KVARA KASITA VORTO.

Stano Marček

PANJO

Panjo, panjo,
eĉ mi scias:
estas granda
festo via.
Volas mi
donaci ion.
Ĉu pupeton?
Ĉu urseton?
Ne!
Prenu mian
amkoreton!

ĈU VI ESTAS OBSERVEMA?

La du desegnaĵoj ŝajnas tute samaj, 'amen inter ili estas diferencoj. Prikiu ili en E-o kaj sendu la skribaĵon al nia redakcio. Unu el la solvintoj ricevos premion. Bonŝancon!





Nur 26-jara li forlasis nin! En la aĝo de juneco, de planoj, de sopiroj. Aĝo, en kiu la fortoj firmigas por efektiviĝi la sopirojn!

Granda parto el la projektoj de Ruslan restis neefektivigitaj de lia mano, de li mem. Sed dum sia mallonga vivo li enplektis sian nomon en la agado de multaj sociorganizaĵoj.

1972 j. Ruslan lernis E-on kaj fariĝis membro de societo „Albatroso“ en Varno. En decembro de la sama jaro oni elektis lin membro de la societa estraro. Eksterordinare disciplinita, sindona en laboro, bona organizanto, li estis sekretario de Komsomolo en kvartalo „Primerski“ II. Plenferte li partoprenis la preparlaboron por la 63a UK de E-o en la urbo.

Delonga deziro de la estraro de „Albatroso“ fine realiĝis: en

1978 j. Ruslan fondis junularan sektion ĉe la societo kaj fariĝis ĝia unua prezidanto. Ĉiam agema kaj modesta, altkonscia, nobla kamarado kaj fidela e-isto — tia restos Ruslan en la memoro de ĉiuj, kiuj lin konas, kiuj renkontiĝis kun li sur la kampo de la sociagado, sur la verda kampo de E-o.

Ni kliniĝas antaŭ lia hela memoro, promesante fidele kaj entuziasme labori por la triumfo de E-o, de la paco, de la socialismo!

En Stara Zagova forpasis

Pejo Kajrakov

emerita instruisto, kulturkleriga aginto, membro de E-societo „Verda Stelo“. Dum sia vivo li gvidis E-kursojn kaj multe propagandis E-on.

NACIAJ E-ARANĜOJ DUM 1980

nomo	dato	loko	adreso
1. Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE)	26—27. I	Kubrat	Есперантско д-во „Прогрес“
2. Konferenco de la E-junularo de Nordorienta Bulgario	23—24. II	Kubrat	Есперантско д-во „Прогрес“
3. Landa revuo de E-parolo kaj kanto	—3. IV	Loveĉ	София, БЕС, п. к. 66, М. Еленова
4. Printempaj semajnaj E-kursoj	3—9. IV	Loveĉ	София, МЕШ, п. к. 66
5. Printempa Amika Renkontiĝo Esperantista (PARE)	5—6. IV	Ruse	Русе, п. к. 208, Стойчо Цанков
6. Seminario por aktivuloj el la Distrikto de Plovdiv	26—27. IV	Karlovo	Есперантско д-во „Васил Левски“
7. Regiona renkontiĝo de la e-istoj el Loveĉ-distrikto	10—11. V	Trojan	Есперантско д-во „Балкана стело“
8. Internacia Turista E-Renkontiĝo	15—25. V	Velingrad	ул. „Бр. Кръстини“ 14, М. Чолев
9. Regiona pedagogiaj E-konferencoj	18—19. V	Velingrad	ул. „Бр. Кръстини“ 14, М. Чолев
	24—25. V	Pleven	Есперантско д-во, Ц. Церковски 14
	1—2. VI	P. Trămbes	Есперантско д-во, „Л. Каравелов“ 22
	14—15. VI	Jambol	Есперантско д-во п. к. 25
	21—22. VI	Pernik	Есперантско д-во п. к. 73
10. Festo de la rozo	1—2. VI	Karlovo	Есперантско д-во „В. Левски“
11. Renkontiĝo de du generacioj	7—8. VI	Sofio	София, БЕС, п. к. 66
12. Esperanto-kursoj kaj ferioj	aparta plano	Drujevo	ОГР на БЕС, п. к. 268
13. Internacia E-kursejo (filioj en Pisanica kaj Varna)	aparta plano		София, МЕШ, п. к. 66
14. Renkontiĝo de e-istoj el Sudokcidenta Bulgario	15—16. VI	Samokov	Есперантско д-во „Рила есперантисто“
15. 40a jubilea E-kongreso de la bulgaraj e-istoj	12—14. VII	Plovdiv	Организационен к-тп., к. 184
16. Nacia junulara E-konferenco	12—14. VII	Plovdiv	Организационен к-тп., к. 184
17. Internaciaj E-kursoj por instruistoj	aŭgusto	Burgas	София, МЕШ, п. к. 66
18. Internacia E-seminario	16—30. IX	Velingrad	„Бр. Кръстини“ 14, М. Чолев
19. Turista migrado tra Vitoŝa	10—12. X	Vitoŝa	София, п. к. 45
20. Landa studenta renkontiĝo	30. XI—1. XII	V. Tărnovo	
21. Regiona renkontiĝo de la E-junularo el Sudokcidenta Bulgario	11—12. X	Blagoevgrad	
22. Novjara balo	29. XII—2. I	Pisanica	София, МЕШ, п. к. 66
23. Novjara balo	30. XII—3. I	Varna	София, МЕШ, п. к. 66

